

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2012

8-9

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2012. №8-9 (214-215)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldon: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №8-9 (214-215).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 20 августа 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.



Sur kongres-sezonaj fotoj, kiujn ni amase ricevas, ofte svideblas variaj verdaj standardoj, eĉ tre amuzaj, kiel la supra, farita en Slovakio (vd. p. 7). Estas utile rememori la vortojn de Zamenhof, diritajn antaŭ 105 jaroj en Kembriĝo.

«... ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si enhavas. Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monotesima, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma. *Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.*

En Esperantujo regas ne sole la *lingvo* Esperanto, sed ankaŭ la interna *ideo* de la esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala esperantismo, — tie regas ankaŭ io alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita, sed tre bone sentata de ĉiuj esperantistoj — tie regas la *verda standardo!*

Kio estas la verda standardo? ... ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj,

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.*

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio ... vivu, kresku kaj floru la verda standardo!»

Ve, sur la kovropaĝa foto (de Jukka Pietiläinen) de la Hanoja kongresejo ni ne vidas la verdan standardon...

Hanojo – eburtura kongreso

97a Universala Kongreso de Esperanto

Hanojo, 28 jul – 4 aŭg 2012

Kongreso malgranda, magra, eburtura, multaĝa kaj varmega, tiuj ĉi eble estas la ĉefaj karakterizoj de ĉi-jara Universala Kongreso en Hanojo, la Vjetnamia ĉefurbo. La kongreso estis la plej malgranda dum la lastaj 28 jaroj kaj havis nur 866 aliĝintojn, kaj eble nur sepcenton da partoprenantoj. La kongresurbo estis simple tro fora kaj eble tro malbonveniga pro la varmo kaj humideco, eble influis ankaŭ la ekonomia krizo en diversaj partoj de la mondo. Tamen la kongreso donis eblecon al 150 vjetnamaj esperantistoj, plejparte novaj kaj junaj, eblecon partopreni UK-on same kiel al dekoj da esperantistoj el aliaj landoj de la regiono. Ankaŭ diversaj sanproblemoj venis al miaj oreloj pli ol neniam antaŭe en UK-oj, ĉu pro la lokaj kondiĉoj iom defiaj, ĉu pro la maljuniĝanta aĝstrukturo de la kongresanoj.

La kongresa libro nur 88-paĝa, tiom magra ke ĝi facile malaperis en sako inter paperoj. Ne nur la listo de aliĝintoj plenigis malpli da paĝoj ol kutime, ankaŭ la programo estis pli magra ol kutime. En la retejo de UEA la programo aperis nur du tagojn antaŭ la UK, pro simpla forgeso en la Centra Oficejo. Se oni vere bezonus la programon pli frue, oni estus plendinta al CO, sed venis neniu plendo pri tio. Nu, certe utilas scii la programon pli frue, sed tio neniel estas esenca.

La malgrandeco de la kongreso tamen apenaŭ sentebliis en multaj programeroj, kiuj kolektis pli-malpli kutiman kvanton da partoprenantoj. IKU-prelegoj estis popularaj, esperantologia konferenco kolektis plenan salonon, kunsidoj de subkomitatoj same malmulte kiel kutime. Eble la loko, kie la malmulteco plej videblis estis la libroservo (la ĉefa loko por tiuj, kiuj ne trovis interesan programeron), kiu ofte estis preskaŭ

malplena. Nu, granda parto ne havis monon kaj multaj aliaj ne lokon en siaj valizoj. En kultura programo la ĉefa pinto estis farso de Georgo Handzlik kaj Saŝa Filipoviĉ sub la titolo *Kompleta (preskaŭ) Historio de UK-oj*.

Eble granda parto de (Eŭropaj) kongresanoj spertis ian kulturen ŝokon dum la unuaj tagoj. Esti tro varme kaj humide, homoj manĝantaj kaj vendantaj manĝaĵojn surstrate, malorda trafiko sen respekto al trafiklumoj. Tio ne ĝenis tiujn pli riĉajn kongresanojn, kiuj restis plejparte ene de la kongresejo, kiu estis kvin-stela hotelo, sufiĉe for el la realoj de la apudstrata vivo. Se en apudaj manĝejoj tute bonaj eblis manĝi per du eŭroj, jam unu biero en la hotelo kostis kvin, same estis pri kafo kaj kuketoj. Certe multaj, inkluzive de la prezidanto de UEA, preferis manĝi aliloke, ne nur pro la kosto, sed ankaŭ pro la fakto, ke eĉ per mono ne



Hanojo (Fotis Stanislas Belov)

eblis ricevi manĝaĵon rapide en la kongresejo. Tamen la plejparto de kongresanoj povis ankaŭ renkontiĝi kun la strata vivo de ordinaj vjetnamoj. La kvin-stela hotelo, kiel ankaŭ CO-anoj konfesis, malbone taŭgis por la esperantistaj kongresoj: la gardistoj tamen neniel ĝenis la kongresanojn, eĉ se sidantaj en kafejo sen mendi ion, sed tamen la kontrasto fariĝis sufiĉe okulfrapa.

Nu, la alia solvo, la teknika universitato, kie okazis la solenaĵoj kaj vesperaj programoj, ne havis klimatizilojn kaj krome estis eble eĉ pli for

Tradicie, en la fermo de la Universala Kongreso oni prezentas la tekston de la kongresa rezolucio, kiu estas oficiala deklaro de la kongreso al ekstera publiko. Ĉi-jare la komisiono pri la kongresa rezolucio (Mark Fettes, Amri Wandel kaj Mireille Grosjean) pretigis la tekston pli frue, por ke oni povu ĝustatempe traduki ĝin nacilingven. La vendredan matenon la Komitato de UEA aprobis la tekston, kiu estas ĉi-sube.

125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo

Kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2012, pli ol 800 partoprenantoj el 62 landoj en la 97a Universala Kongreso de Esperanto rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto.

Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kaj potencon rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj.

Por internacia komunumo kiu klopodas realigi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto proponas kompletigan evoluvojon al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj kun ŝtatoj, sed homoj kun homoj.

125 jarojn post sia apero, Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco, kaj disvolviĝo — evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64a lingvo en la ret-tradukilo de Google.

Ni invitas homojn el ĉiuj landoj utiligi kaj kunkonstrui tiun ponton, cele al pli justa kaj paca mondo, kie disfloras ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

de la meza hanojano. Tie dum la inaŭguro kaj aliaj programeroj super la podio aperis fiksita tekstpanelo kun teksto en la vjetnama, kiu laŭ Gugla tradukilo signifas “Vjetnama komunisma partio vivu la glora”. Tio ne ĝenis kongresanojn, ĉar malmultaj ĝin komprenis, kaj temis pri fiksita panelo, kiun ne eblus facile forpreni aŭ kovri. La sama teksto videblis ankaŭ plurloke en la urbo.

Kongreso en milde aŭtoritata lando havis bonan rilaton kun la aŭtoritatoj. Malofta gasto en la inaŭguro estis la alta protektanto, la vjetnama vicprezidanto, Nguyen Thi Doan, kiu ankaŭ salutparolis.

Krome unu el la kulminoj de la inaŭguro estis la transdono de la Medalo de Amikeco al UEA. La prezidento de Vjetnamio decidis aljuĝi tiun honoron al UEA “por rekoni la grandan apogon de UEA kaj de la internacia esperantista komunumo al la vjetnama popolo dum ties naci-defendado, rekonstruado kaj disvolviĝado”. Tamen kiel montriĝis en postaj diskutoj, UEA neniel helpis Vjetnamion dum la milito, sed male kontraŭstaris subtenantojn de Vjetnama popolo nome de neŭtralismo. Nu, medalon oni akceptu eĉ se senmerite. Tamen multaj esperantistoj, ankaŭ partoprenantoj de la nuna UK, kontraŭstaris la Vjetnaman militon en siaj landoj.

La urbestra akcepto okazis ne en la urbodomo, sed en eble pli reprezentiva hotelo. Laŭ la azia kutimo la gastoj ricevis ankaŭ donacojn, inter

alie vazon, 50 centimetrojn altan (feliĉe ne pezan), kiu plenigis sufiĉe da spaco en la valizoj de la kongresanoj. La urbestra akcepto ofertis pli buntan nacian programon ol la nacia vespero mem, kiu estis aparte magra por kompari kun kelkaj aliaj kongresoj. Nura kant-kaj dancgrupo kun tamburistoj. Mi certas, ke la vjetnama kulturo estus pli multflanka. Nu, la urbestra akcepto kompensis la aferon per populara kantisto, muziko kaj dancoj.

La noveco de la vjetnamaj esperantistoj videblis ankaŭ en realigo de programeroj. Dum ekskursoj, inkluzive la antaŭkongresan ekskurson, la esperantista ĉiĉerono ne kapablis traduki kaj necesis improvize peti angleparolantan kongresanon traduki el la angla. Same necesis en la postkongresa ekskurso, kie la tro granda nombro da partoprenantoj igis gvidadon problema, necesis du aŭtobusoj kaj la ekskurso havis nur unu esperantistan ĉiĉeronon. Ankaŭ la angleparolantaj vjetnamaj profesiaj ĉiĉeronoj estis foje nur malfacile kompreneblaj, eĉ por denaskuloj. Vjetnamoj ankaŭ ne aperis inter la prelegantoj de IKU, sed troviĝis unu kontribuanto por la esperantologia konferenco. Krome la prelegoj pri Vjetnamio estis multaj kaj multflankaj.

Feliĉe, post tiu ĉi varmega kongreso sekvos du agrable malvarmetaj. Ja la Bonaera UK okazos dum la sudhemisfera vintro.

Jukka Pietiläinen

Junaj vjetnamaj esperantistoj, kiuj entuziasme volontulis en Hanojo, estis aplaŭditaj de la kongresanoj en la kongresa fermo. (Fotis Stanislao Belov)



UEA premiis en Hanojo

Fondaĵo Antoni Grabowski celas subteni la Esperantan kulturon. Premion de 650 usonaj dolaroj ricevis la nederlanda intelektulo Gerrit Berveling. Premion je la sumo de 500 dolaroj ricevis la ARTaj KONfrontoj en ESperanto (ARKONES) en Poznano, Pollando.

Diplomo pri Elstara Agado: Huang Yinbao (Trezo) el Ĉinio pro agado en la instruista Esperanto-movado; Dennis Keefe el Ĉinio pro la iniciato de lingvaj festivaloj kaj evoluigo de metodoj de Esperanto-instruado kaj de universitata uzado de Esperanto; Potturu V. Ranganayakulu el Hinda Unio pro agado sur loka kaj monda niveloj kaj pro verkado de Esperanto-lerniloj; Boĵidar Leonov el Bulgario pro Esperanto-agado en sia lando kaj aparte en universitataj medioj; Barbara Despiney kaj Renée Triolle el Francio pro longtempa reprezentado de UEA ĉe Unesko; Halina Gorecka el Ruslando pro prizorgado de la eldonejo *Sezonoj* kaj la revuo *La Ondo de Esperanto* kaj Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo pro agado ĉe Rio+20, la konferenco de UN pri daŭripova evoluigo en Rio-de-Ĵaneiro en junio ĉi-jare.

Diplomo pri Elstara Arta Agado: Mikaelo Bronštejn (Ruslando) pro longtempa kontribuo al la Esperanta literaturo kaj muzika kulturo; Julián Hernández Angulo (Kubo) pro longtempa kontribuo al la Esperanta muzika kulturo; Ulrich Becker (Usono) pro la gvidado de la eldonejo *Mondial* kaj la eldonado de la revuo *Beletra Almanako*.

Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia el la Brazila bieno-lernejo *Bona Espero* ricevis la **Premion Onisaburo Degučĉi**. La Estraro de UEA aljuĝas tiun “esperantistan pacpremion” pro agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de Zamenhof kaj Onisaburo Degučĉi. La Premio, starigita per donaco de Oomoto, konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

La ĉina junulo Zhao Wenqi fariĝis la unua ricevanto de la **Premio Diana Aitai**, kiun UEA starigis per donaco de la estona esperantisto Peeter Aitai por omaĝi la memoron de lia filino Diana, kiu forpasis nur 22-jara en tragika akcidento en 2011. La premio celas rekoni kaj kuraĝigi la plej junan aktivan anon de la Internacia Koruso de UK. Diana Aitai mem estis korusano en la UK-oj de Roterdamo (2008) kaj Bjalistoko (2009). La premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 100 eŭroj. **GK UEA**

Karavane al UK

Ĉi-jare estis planitaj du karavanoj laŭ la Trasiberia Fervojo al Hanojo, sed nur unu sukcesis: 22 esperantistoj atingis la ĉefurbon de Vjetnamio kaj partoprenis en la Hanojaj UK kaj IJK.

Verŝajne, ilia entrepreno, organizita kadre de la projekto *La Vojaĝo* (www.vojagxo.info) estis la plej ekstravaganca maniero atingi la kongresojn. La karavano el Moskvo al Hanojo startis la 8an de julio, kiam la plimulto de la partoprenantoj kunvenis en la Ruslanda ĉefurbo por ekvojaĝi laŭ la Trasiberia Fervojo.

Grupe kunveturis kongresanoj el Brazilo, Nederlando, Norvegio, Francio, Usono kaj Ruslando. La itinero komenciĝis en Moskvo, kie la karavanoj pasigis du tagojn. Poste estis Jekaterinburgo, la unua urbo en la Azia parto de Ruslando, apud la limo de Eŭropa kaj Azio. Poste la karavano dum du tagoj veturis trajne al Bajkalo, la plej granda lago en la mondo. Ĉi tie la vojaĝantoj vizitis ankaŭ la valon Tunkinskaja kun monta torento kaj akvofalo, varmajn fontojn, kaj fine ŝipveturis laŭ la lago Bajkalo al la malnova Ĉirkaŭbajkala fervojo.

Post Ruslando estis la vico de Mongolio. Pro grandaj ŝtopiĝoj en la mongola ĉefurbo ne eblis viziti ĉiujn ĉefajn vidindaĵojn de Ulanbatoro, tamen oni sukcesis viziti la gigantan statuon de “la mastro de la mondo” Ĝingis-Hano kaj aĉetis mongolajn memoraĵojn.

Trajno tra la dezerto Gobio kaj nokta buso alportis la grupon al Pekino, kie ni renkontiĝis kun esperantistoj el aliaj landoj kaj kune vizitis la Ĉinan Grandan Muron. Kaj la lasta sinĵeto — veturo al Naningo, kaj fine al Hanojo. Malantaŭe restis pli ol 8500-kilometra vojo, vidindaĵoj de tri landoj, sukcesoj kaj malsukcesoj, kaj la senpreza sperto de vojaĝo per Esperanto.

La karavano finiĝis en Hanojo, kaj la sperto akirita ĉi-jare baldaŭ helpos realigi novajn projektojn en la kampo de peresperanta turismo.

Vadim Biserov



Ĉe la trajno en Ulanbatoro



La solena malfermo en Galivo: la urbestro Terry O'Flaherty, la prezidanto de EEU Seán Ó Riain, iama konsilistino Mary Leahy (Fotis Peter Baláž)

La 9a Eŭropa kongreso en Galivo

La 9a kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) okazis la 16–20an de julio 2012 en la irlanda urbo Galivo (angle: Galway; irlande: Gaillimh) kun 157 partoprenantoj el 28 landoj.

La prezidanto de Irlando, Michael D. Higgins, estis la patrono kaj sendis tre pozitivan kaj kuraĝigan mesaĝon pri Esperanto. Li menciis, ke Esperanton studis la fondinto de la irlanda laborista partio, James Connolly, poste mortpafita kiel unu el la ĉefoj de la ribelo de 1916. Ankaŭ la irlanda ministrino pri Eŭropaj aferoj, Lucinda Creighton, sendis gravan mesaĝon, en kiu ŝi vorto gravas. Ambaŭ substrekis ke “Esperanto apartenas al la komuna Eŭropa kultura heredaĵo”.

Malfermis la kongreson la urbestro de Galivo, Terry O Flaherty, kaj iama urba konsilistino kiu aranĝis la inviton al Galivo por EEU, Mary Leahy.

La kongresa temo, “Lingvolernado en Eŭropo: lerni pli, kosti malpli” estis aparte interesa por la irlanda neesperantista publiko, kaj certe vekos daŭran intereson pri Esperanto en Irlando.

Tri neesperantistaj irlandaj fakuloj prelegis en Esperanto. Inter ili la nacia komisiito por oficialaj lingvoj Seán Ó Cuirreáin, kiu raportas ĉiujare rekte al la irlanda parlamento. Li faris ankaŭ ege pozitivan intervjuon pri Esperanto kaj ties lernfacileco en TG 4, kie ankaŭ montriĝis Maja Tišljár kiel denaskulino kiu legis tre konatan poemon de la irlanda literaturo en Esperanto, *La Noktomeza Kortumo* de Brian Merriman. La du aliaj fakuloj irlandaj estis de la universitato de Galivo mem, d-ro Nollaig Ó Muraíle, kaj de Belfasto, d-ro Eoghan Mac Éinrí, por Nordirlando.

Prelegis gravaj fakuloj esperantistaj

kiel Wim Jansen, Renato Corsetti, Angela Tellier, Michele Gazzola, Nikola Rašić, Zlatko Tišljár, Jozef Reinvar, Tim Morley, Paul Gubbins, k. a.

Abundis la ekskursia programo tra tre bela regiono de Irlando kaj ankaŭ kulturaj programoj, aparte elstaris irlanda nacia vespero kun la fama irlanda muziko kaj dancoj. Tre ŝatata estis la teatraĵo *Ludoviko* de Georgo Handzlik.

La organoj de EEU havis siajn kunsidojn: dufoje kunsidis la asembleo, kiu akceptis la raportojn kaj laborplanojn kaj diskutis pri la ĉefaj punktoj de la nuna politiko de EEU: kiel agi pri la demando de popola iniciato post kiam la EK malakceptis registri nian proponon pri iniciato rilate la Eŭropan himnon (okazos apelacio) kaj pri nia estonta agado en Platformo pri multlingvismo establita de la Eŭropa Komisiono, en kiu malfermiĝas novaj ebloj. La estraro kunsidis unufoje, ĉefe traktis la demandon de la financoj de EEU, kaj akceptis inviton, ke la 10a kongreso de EEU okazu en 2014 en la slovak urbo Nitra.

La kongresa rezolucio estas turnita al la ekstero, ĉefe al la irlanda registaro kaj al la Kipra konferenco pri multlingvismo kiu okazos en septembro 2012.

La kongreso certe atingis sian celon plikonsciigi la irlandajn edukinstancojn pri la ŝanco uzi Esperanton kiel prope deŭtikilon, ne nur por lerni neirlandajn lingvojn sed ankaŭ por pliefikigi la lernadon de la irlanda lingvo mem. La kongreso interalie invitis la irlandan registaron nomi inter siaj prioritatoj dum la prezidado de EU en la unua duono de 2013 la multlingvismon. Tion ankaŭ subtenas la Eŭropa Komisiono, kaj ni esperas sukcesi en tio.

La irlandaj amaskomunikiloj montris grandan intereson pri la kongreso.

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

IEK: Sciencfikcio kaj robotoj

Sur la kovrilpaĝo de la junia *Ondo* aperas la kvar membroj de la Ibera Grupo. Venis al ni Abel Montagut en 2008, kiam IEK (Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK) okazis en Slovenio, kaj Miguel Gutiérrez Aduriz ĉi-jare por IEK, kiu okazis de la 14a ĝis la 20a de julio 2012 en la ĉeĥa urbeto Svitavy.

“Sciencfikcio kaj Robotoj!” estis la temo en nia rondo, elektita en Herzbergam-Harz antaŭ du jaroj. Pri ĝi prelegis unue Petro Chrdle, kiu ĵus eldonis la dramon *R.U.R.* de Karel Čapek. Li prelegis pri la du fratoj Čapek, ĉar Josef proponis la vorton “robotoj”, kiu iĝis tutmonda. Je la fino de la semajno ni spektis teatraĵon tiele titolitan, kaj altnivele rolludis junuloj de la urba liceo, kiuj bele elparolis Esperanton. Reĝisoris Radka Oblouková.

Toon Witkam, kiu proponis la temon, prezentis la verkon *Terra* de István Nemere, kiu mem venis kaj parolis pri la estiĝo de la vivo sur la Tero kaj demandis sin, ĉu eble ĝi devenis el alia kosmoparto dismetita de alia estaĵo pli matura, kaj pri la evoluo de la vivo en la Tero. Li estas konvinkita, ke iam la homo estos devigata elmigri de sia medie difektita planedo al eble alia galaksio.

Miguel Gutiérrez enmetis mirindan gamon de interesaj ideoj, kiuj instigis viglajn reag-diskutojn ĉe la aŭskultantaro. Li ricevis multe da aplaŭdoj, eĉ se ne ĉiuj konsentis pri la proponitaj ideoj. La temo tuŝis filozofiajn terenojn: “De kie devenas la vivo?” kaj “Estonte, kiun rolon elprenos robotoj?” Ni debatis pri la danĝero, kiu kaŝiĝas en tiu evoluo. Li ankaŭ prezentis numerojn de sia libroserio *Sferoj* (Sciencfikciaj eroj).

Mikaelo Bronštejn regalis nin per fotoj kaj rakonto pri la fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij, sciencfikciaj aŭtoroj konataj ne nur en Ruslando, kaj kunportis diversajn verkojn de ili.

Mélanie Maradan surprizis nin pri *Zorg-robotoj*: ili jam ekzistas en Japanio, helpas handikapulojn, kiuj povas plenumi neniun taskon. Ili estas stirataj helpe de voĉaj komandoj. Sed kiel alparoli ilin? Estas bezonata nova lingvo, kiu malebligas ambiguajn, miskomprenoblajn komandojn. Ŝi kunlaboras en tiucela projekto.

Ĉar ni kunvenis en ege bela biblioteko de la Ottendorfer-domo, Detlev Blanke kaj Miroslav Malovec gvidis la



István Nemere parolas en Svitavy

seminaron: “Esperanto-Bibliotekoj kaj Arkivoj. Kiel savi la materialon?” Grave estas jure certigi statuson ankaŭ de la propraj kolektoj ĝustatempe.

Dumtempe, Stano Marček gvidis Esperanto-kurson al dudeko da lernantoj, entuziasmitaj de lia metodo.

Akceptis nin la urbestro David Šimek kaj Jana Pernicová, membro de konsilio de Pardubice-regiono. Nia aranĝo estis mirige bone organizita de Petro Chrdle, kiu bedaŭrinde diris, ke li faras tion por la lasta fojo, ĉar li deziras nun dediĉi sian tutan tempon al eldono. Libuše Dvořáková, prezidanto de la Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy, ĉarme, efike kaj diskrete klopodis pri ĉio kun tuta teamo.

Ni aŭskultis koncertojn de Mikaelo Bronštejn kun Elena Puchova kaj Dmitrij Dovžik, kantojn en la hispana, ĉeĥa kaj aliaj lingvoj de Miroslav Smyčka kaj Pavla Dvořáková. Gerrit Berveling prezentis al ni siajn tradukojn de *Antologio Latina*, Margit Turková deklamis omaĝe al la fantazianto Ĉestmír Vidman, kaj Russ William kaj Anna Skudlarska prezentis al ni filmon, kiun ili lerte subtitoligis Esperanten: *Seksmisio*, kies fino estas tute neatendita!

Ne mankis solena ekumena diservo, kiun gvidis pastroj Gerrit Berveling kaj Zdeněk Gerhard Klimeš kun helpo de laiko Pavel Polnický.

Svitavy ekde nun disponas pri ĵus plantita tilia Esperanto-arbo, kies apudstarantan memorŝtonon senvualigis kune

ARKONES

Poznań (Pollando)

21–23 sep 2012

la OSIEK-prezidantino Anne Jausions kaj la urbestro Pavel Šimek.

Multe da surprizoj rezervis al ni la temo, sed ankaŭ la malkovro de la regiono: ne nur la beleta urbo Svitavy, sed ankaŭ tiu, kiu fondis ĝin: Litomišlo, kaj unufoje pli, post la vizito de tiu ĉi urbo, tre bone tradukita de Pavla Dvořáková, ni honoris la tombon de Karolo Piĉ, same kiel en 2001. Alian tagon Moravská Třebová senvualigis al ni siajn monumentojn.

Je la fino, la OSIEK-Premio estis atribuita al István Ertl pro lia traduko de *Sensorteco* de Imre Kertész.

La sekva IEK okazos de la 20a ĝis la 26a de julio 2013 en Saint-Amand-Montrond, meze de Francio kaj estos organizita de Ĵak LePuil kaj Armela Le Quint. La temo estos: *Esperanto kaj Muziko*.

Anne Jausions

Someraj ferioj apud Kolonjo

Agrable pasigi esperantlingvajn feriojn — jen la celo de SOMERE, SOMERA MEzeŭropa RENkontiĝo, kiu bele realiĝis ankaŭ ĉi-jare dum la deka kunveno. De la 13a ĝis la 21a de julio dudeko da partoprenantoj kunvenis en agrabla ejo en Jünkerath sude de Kolonjo, Germanio — ĉi-foje ankaŭ kun kelkaj infanoj. Kiel kutime la ĉeestantoj venis el Pollando, Belgio, Francio kaj Germanio, kio zorgis pri malkrokodilado kaj bela internacia etoso.

Aldone al promenoj, kafumado kaj babilado — kun flanka konsidero de lingva pliboniĝo — ni ekskursis al la najbara Kronenburg kun ĝia kastelruino kaj ŝatata kafejo, al la vulkanĝardeno en Steffeln kaj al la bestejo en Daun. En la domo okazis kursoj por komencantoj kaj progresantoj subtenataj de prezento de Mazi-filmetoj. Marcel Delforge prezentis lumbildprelegon pri vojaĝo al la Danubo-delta, ni produktis “lum-pentraĵojn” sub gvido de Cédric Forgeau (prenante fotojn de lumomovoj en malhela ĉambro), rigardis memkreitajn filmetojn de figuroj kaj spektis dancospektaklon de Alix.

Granda estis ankaŭ la emo puzli — cirkle kaj tridimensie — kaj kelkfoje la entuziasmo zorgis pri tre malfrua enlitigo... La ludsalono de la domo donis eblecon okazigi ludolimpikon, kiu defiis la lertecon de la partoprenantoj. Entute bela kaj ĝuinda Esperanto-semajno!

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

SES 2012: rekorda kaj perfekta

La 29an de julio finiĝis ĉi-jara Somera Esperanto-Studado 2012. Ĝi tradicie okazis en Slovakio kaj organizis ĝin Edukado@Interreto kun helpo de siaj staĝantoj kaj de Slovaka Esperanta Junularo. Partoprenis rekorda nombro de homoj — 250 personoj el 23 landoj. Origine aliĝis per reto 292 personoj.

Unuavice, surprizis — kaj multe ĝojigis! — nin la alta nombro de aliĝintoj. Tiu ĉi kresko de interesiĝo devigas nin konformigi ĉu programon, ĉu instruadon, sed pli kaj pli gravas ankaŭ elekto de SES-ejo mem. Trovi taŭgajn ejojn por internacia evento vizitata de 200-300 personoj kun favoraj prezoj kaj bonaj kondiĉoj estas ja granda defio... Ĉi-jare okazis SES ankoraŭ en la pasintjara loko — en la belega historia urbo Nitra, en la studenthejmo Zobor. Venontjare ni planas translokigi ĝin al Martin, urbo kun granda historia signifo por la slovakoj kaj la slovak lingvo. Kapacito por loĝigo estas tie pli ol 800 lokoj.

La programo konsistis el antaŭtagmeza instruado; posttagmeze okazis prelegoj, kursetoj, lingvaj kursetoj, kreivaj metioj. La vesperoj apartenis al kulturo, koncertoj kaj diskotekoj. Historia momento venis dum vespera koncerto de Martin Wiese — sursceneje aliĝis al li Bertilo Wennergren, kaj ni povis aŭskulti komune du membrojn de la fama, tamen ne plu ekzistanta rokbando *Persones*... Ĉiujn amuzis la kabareda farso *Historio de Universalaj Kongresoj*. Du aktoroj, Georgo Handzlik (aŭtoro) kaj Saša Pilipoviĉ, belege parodiis kutimojn de esperantistoj dum organizado de internaciaj kongresoj.

Instruado pasis en rekordaj 10 grupoj kun 14 instruistoj. La lernantoj estis dividitaj en grupojn laŭ unuopaj lingvo-niveletoj, laŭ lingva testo dum la unua tago. Du grupoj lernis en apuda restoracio *U zlatej svini* (Ĉe la Ora Porko), kie ili ankaŭ tagmanĝis kaj kafumis dum antaŭtagmeza paŭzo. Ĉi-jare venis novaĵo por komencantoj — ne plu instruis nur la slovako Stano Marček. Lin helpis Mateusz Kulka el Pollando, nuntempa staĝanto de E@I. Kaj duono de novuloj kleriĝis sub la gvidado de Christophe Chazarein el Francio, kaj lia noveca instrumentado ĝenerale multe plaĉis.

Ĵaŭdo, la 26a de julio, apartenis al granda festado — ja nia lingvo festis sian 125-an naskiĝtagon! Vespere okazis speciala programo: ekzameno pri



parkera kantado de Esperanta himno, aranĝita de la Societo por parkere kanti la himnon *La Espero*. Dume spontane ekestis eĉ versio en “gesta lingvo”, oni povas ĝin jam spekti ĉe Youtube. Sekvis konkurso pri la plej verde vestita SES-ano, ŝerce nomita “verda pornografio”, kaj tri kuraĝuloj konkuris en kvizo kun pli aŭ malpli ruzaj demandoj el Esperantio. Sed organizantoj kaŝite preparis ankoraŭ unu surprizon — sur tabloj aperis verdaj kukoj kun lerte faritaj jubileaj flagetoj kaj verdaj trinkaĵoj. Dum la aranĝo okazis dufoje gustumado de bonkvalitaj slovakiaj vinoj — unu oficiala en la SES-ejo, dua dum duontaga ekskurso al Topoľčianky. Fervoraj, ĉiujraj vizitantoj de SES jam certe estas veraj vinfakuloj.

La lastan tagon, dum la adiaŭa vespero Xosé Conde el Katalunio kantis siajn versetojn, kiuj ironie kaj ridiĝe resumis kaj pozitivajn, kaj negativajn flankojn de SES.

Mencioj pri SES 2012 aperis en pluraj slovakaj amaskomunikiloj. En

novajretejoj, retaj gazetoj, eĉ en reta novaĵelsendo de regiona televido kaj en radioelsendoj. Listo de Esperanto-mencioj el Slovakio troveblas en la reto.

La etoso estis simple perfekta. Unue, ni havis internacian organizan teamon kaj la tutan aron da “anĝeloj”; due, venis esperantistoj el 23 landoj. Ĉiuj komune sukcesis krei nekredoblan, vere internacian etoson de amikeco. Estas ĉiam ĝojige vidi ne plu lingvajn barojn, sed homojn el ĉiuj eblaj landoj komune kleriĝi, amuziĝi kaj helpi unu al la alia... Tial sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tio, al la bonega etoso reganta ekde la unua tago ĝis forveturo.

Laŭ la “modesta” opinio de la organizantoj, ni sukcesis konservi la altan kvaliton de la lastaj jaroj, eble eĉ plialtigis ĝin — sed tion devas prijuĝi partoprenintoj mem. Kaj ni kredas, ke kun multaj el ili ni renkontiĝos ankaŭ post unu jaro en la urbo Martin.

Katarína Nosková
SES-kunorganizanto

Fotoj: CC-BY-SA E@I



IKUE: “Mi kredas je unu Dio”

La 65a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) arigis sepdekon da partoprenantoj inter la 14a kaj 21a de julio en Pécs.

La inaŭguro okazis en la ŝtona muzeo apud la katedralo kun ĉeesto de la episkopo de Pécs, d-ro György Udvardy, kiu diris, interalie: “Estas ĝoje vidi, ke la partoprenantoj de la kongreso estas kune laŭ tiu nova maniero de frateco kaj unueco, ke ili ekkonas unu la alian kiam ili okupiĝas pri la nova komuna lingvo, formas kulturon pere de la lingvo Esperanto. Pere de tia lingvo kiu disponas pri la adekvata aprobo de la oficejoj de la Sankta Seĝo por la riĉigo de niaj kristanaj kredo kaj kulturo”.

Lige al la kongresa temo “Mi kredas je unu Dio”, la kongresanoj havis eblecon aŭdi tri altnivelajn prelegojn de lokaj fakuloj, ankaŭ la prelegon de la episkopo “Naturo de la kredo — kredo kiel donaco”. Ilin al Esperanto tradukis sac. Attila Szép, la episkopa kanceliero.

Al la temo de la kongreso kontribuis ankaŭ kongresanoj. Carlo Sarandrea, la sekretario de IKUE kaj redaktoro de *Espero Katolika* kaj de la Esperanto-elsendoj de la Radio Vatikana prezentis la Apostolan leteron “Porta Fidei” per kiu Benedikto la 16a anoncas la Jaron de la Kredo. “Unu Dio, unu Eklezio: multaj kredoj — unu homaro” estis la temo de la prelego de Stefan Lepping. Pri la unua volumo de la libro de Benedikto la 16a *Jesuo de Nazaret* parolis Gottfried Noske. “Kredo kaj racio” bazita je la encikliko de Johano Paŭlo la 2a *Fides et*

ratio estis la prelego de Agota Kirschne. “Sankta Maŭro episkopo de Pécs, benediktana abato de Pannonhalma” kaj “Paŭlanoj: la ununura hungara vira ordeno” estis du prelegoj de sac. Attila Szép. La lumbildprezenton “Lumo fine de la mondo” pri la Jakoba vojo tra Lourdes, Fátima kaj Montserrat al Santiago de Compostela, kiun ili mem faris, prezentis Rita Rössler-Buckel kaj Franz-Georg Rössler.

La prelegon “Liszt Franc kaj la koncepto de la muzika unueco” prezentis geedzoj Rössler. Ili ankaŭ prizorgis la Muzikan Horon. Ĉe la adiaŭa vespero la kongresa kantgrupo prezentis la kanton *IKUE en urbo Peĉo* kiun verkis Franz-Georg Rössler. Tutvesperan orgenkoncerton prezentis Stefan Lepping.

La kongresa programo disvolviĝis en la Cisterciana gimnazio Ludoviko la Granda sur la ĉefa placo de Pécs kaj parto de la prelegoj en la konferenca salono de la Episkopa palaco. La mesoj okazis en la katedralo kaj la preĝejo-moskeo vidalvide al la gimnazio.

La celo de la tuttaga pilgrimo estis la plej granda hungara Maria pilgrimejo Máriagyűd. Tiutage oni vizitis ankaŭ Siklós kaj Villány. Alia duontaga pilgrimo direktiĝis al Bátaszék kaj Szekszárd.

Post la meso en Szekszárd, malantaŭ la preĝejo kaj proksime al la domo de la familio Kirsch, oni inaŭguris la tabulon omaĝe al diakono Johano Kirsch (1961–2012) apud du tabuloj: pri la unua hungara esperantisto Gábor Bálint, kaj pri Pál Lengyel — la unua esperantisto en Szekszárd. Ĉi-maniere oni omaĝis la 125 jarojn de Esperanto kaj 100 jarojn

de la unua IKUE-kongreso en Buda-peŝto. La tabulon malkovris sac. Lajos Kobor kaj Zsófia Kirsch, filino de Johano Kirsch. La florkronon metis la vicprezidantoj de IKUE Marija Belošević kaj Miloslav Šváček. Tiu tago havis ankaŭ tre kortuŝan finon per preĝo ĉe la tombo de Johano.

La Asembleo de IKUE krom diskuto de la pasinta agado, diskutis pri la venontjara kongreso, kiu okazos en la regiono de Trento (Italio). Probable ĝi estos ekumena, kune kun KELI.

La kongreso havis apartan filatel-aĵon — poŝtmarkoj kun la motivoj de la gastiganta urbo kaj aldone simbolo de la kongreso kaj portreto de Johano Kirsch. Krom la spirita riĉigo al la kongresanoj restis belaj rememoroj, kaj al la movado unu plia ZEO!

Marija Belošević

KELI: Kaŝitaj Trezoroj

La 62a kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) okazis ekde 29 jul ĝis 5 aŭg en la germana urbo Zöblitz, en la ercmontara regiono inter Saksio kaj Bohemio. La kongresejo Hüttstattmühle estas eklezia feriejo ekster Zöblitz, paroĥejo de pastoro Wolfram Rohloff, prezidanto de la germana KELI-sekcio. Partoprenis 54 personoj el 11 landoj.

Pasinteco en la ercmontaro estis okupitaj ministoj por elfosi ercojn, kaj pro tio la kongresa temo estis “Kaŝitaj Trezoroj”, kiujn la kongresanoj serĉis en la Biblio kaj en ADORU, la admirinda diserva kant- kaj preĝlibro.

La kongresaj programeroj donas impreson de la travivaĵoj:

- Matena kaj vespera preĝo;
- Ĉiutaga kanthoro kun Albrecht Kronenberger;
- Du Diservoj kun monkolleto por *Evidente*;
- Koncerto de la orgenisto Ernst Leuze kaj la sopranino Elisabeth Rohloff;

— Tuttaga ekskurso al Seiffen, liberaera vilaĝmuzeo kun multaj vendejoj de Kristnaskaj lignaĵoj kaj ludiloj; en Neuhausen vizito de impone granda muzeo de nuksrompiloj;

- Duontaga migrado;
- Ercmontara popola muziko prezentita de tri virinoj kaj citroludanto;
- Jarkunveno de KELI kaj de la germana KELI sekcio;

Okazis ankaŭ pluraj prelegoj de kongresanoj pri diversaj temoj.

Siegfried Krüger



Tributula ZEO en Szekszárd

Inter Utopio kaj Realo

Unu lingvo savon donos, se ĝi sonos tra la ter'... Tial sciu la homar': Mena-de bal pŭki bal! — Ĉi kanto-linĵoj aŭdiĝis la 15an de junio en la Princa Salono de Bavara Ŝtata Biblioteko (BŠB). Ili devenas de la dua strofo de himno, kiun la biblioteka koruso prezentis okaze de la malfermo de la ekspozicio *Inter Utopio kaj Realo: Konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo*. Oni kantis en la origina lingvo Volapŭk. Ĉi lingvo, inventita por la tut-monda komunikado fine de la 19a jar-cento, elirante de Suda Germanujo disvastiĝis tut-monde dum pli ol deko da jaroj, sed poste forgesiĝis. En Munkeno la Volapŭk-himno jam unu fojon prezentiĝis antaŭ precize 125 jaroj: sia-tempe tie okazis la 2a universala kongreso de Volapŭk.

BŠB tamen dediĉis sin al la temo *Konstruitaj lingvoj* ne por memori pri ĉi evento. Du aliaj dat-revenoj inspiris al tio: en 2012 okazas la centa dat-reveno de la morto de prelado Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapŭk. Schleyer esperis simpligi la tut-mondan komunikadon per Volapŭk kaj akceli la interkompreniĝon de la popoloj. Kun la sama celo en 1887 Lazaro Zamenhof sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto publikigis sian Lingvo Internacia. Ĉi lingvo — konatiĝinta kiel Esperanto — fariĝas 125-jara en la nuna jaro. La sam-tempuloj nomis Volapŭkon kaj Esperanton same kiel multajn aliajn projektojn ĉi-specajn “mond-helplingvoj”. La moderna lingvo-scienco preferas la neŭtralan esprimon “plan-lingvo”.

BŠB spertis la bonan ŝancon, ke ĝi povas apogi sin sur tri kolektoj por selekti ekspoziciajn objektojn por formi laŭvide plaĉan ekspozicion pri temo iom abstrakta.

Kiel human-sciencia biblioteko universala kun signifaj malnovaj stokoj ĝi disponas pri grava historia kaj aktuala literaturo pritema. Por ekzemplo: ĝi posedas la stokojn de la Munkena Volapŭka Klubo. Ili ampleksas ne nur revuojn kaj lerno-librojn, sed ankaŭ etajn presaĵojn kiel enir-biletojn, menukartojn aŭ kolektojn de gazet-eltranĉoj pri Volapŭk-aranĝoj. Dank’ al la perado de d-ro Hermann Holzbauer, la long-jara direktoro de la universitata biblioteko (UB) Eichstätt, Irmi kaj Reinhard Haupenthal transdonis en 2006 al BŠB sian kolekton *Planlingvoj kaj Interlingvistiko* ampleksantan pli ol 10000 bibliografiajn unuojn. Pri ĉi unika kolekto aparte grava por la Volapŭk-



En Munkeno Reinhard Haupenthal prezentis la enkondukan prelegon pri interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ mult-nombra publiko (*Fotis: Irmi Haupenthal*)

esplorado, la iama estro de la akir-sekcio de Vurtemberg Landa Biblioteko, d-ro Klaus Schreiber, atentigis la UB Eichstätt. Kvar jarojn poste la filoj de Hanns Martin Schleyer donacis al BŠB la german-lingvan parton de la biblioteko de Johann Martin Schleyer kaj ties 23 tag-librojn.

En sia malferma parolado Ĝenerala Direktoro d-ro Rolf Griebel kore dankis al Irmi kaj Reinhard Haupenthal kiel ankaŭ al Jörg Schleyer, kiu reprezentis sian familion dum la solenaĵo, por iliaj grand-animaj donacoj. Same li aprecis la engaĝiĝon de d-ro Hermann Holzbauer.

Reinhard Haupenthal prezentis la fest-prelegon *Kio estas kaj kiu-cele oni okupiĝas pri interlingvistiko?*, en kiu unue li klarigis la historion de la termino “interlingvistiko”, poste skizis la esplor-kampon kaj formulis sciencajn dezir-indojn.

En la ekspozicio, dank’ al la supre skizita elstara stoko-stato, povis prezentiĝi, por ekzemplo, la germana kaj la rusa versioj de la Unua Libro, larĝa paletro da Esperanto-vortaroj, -tradukoj kaj -originaloj. Dokumentoj pri Volapŭk-aranĝoj, Esperantaj kongres-libroj, Esperanto-insignoj kaj -afiŝoj ekspoziciĝas kaj donas impreson pri la manifestiĝo de la vivo de volapŭkistoj kaj esperantistoj kaj pri tio, kian formon oni donis al la festo-tagetoj. Por Munkeno kaj ties ĉirkaŭaĵo apartan intereson havas la historio de la Parkurbo Esperanto planita en 1912/13 en la komunumo de Gräfelting. La Kolekto por Planlingvoj de Aŭstria Nacia Biblioteko kaj la

komunumo Gräfelting ebligis la instalon de vitrino kun varb-materialoj pri ĉi projekto. Kunlaborantoj el Bavara Landa Oficejo por Ter-mezurado kaj Geo-Infoformado disvolvis 3D-simulon montrantan kie nun-tempe situus ĉi setlejo, kiel la tereno sia-tempe previdita por la setlejo uziĝis tiam kaj kiel ĝi prikonstruiĝis hodiaŭ.

Kiel specon de laŭtema enkonduko la ekspozicio prezentas ekzemplojn de konstruitaj lingvoj el la 17a jar-cento. En tio du iniciatoj konsideriĝas. Unu-flanke la koncepto organizi surbaze de latino kiel “Interlingua” skriban komunikadon per kodoj sen tio, ke la sendanto kaj la ricevanto nepre devus scii mem la lingvon de la alia. Krom tio, la celo pli vasta, inventi lingvon kiu povus aplikiĝi tut-monde tiel skribe kiel parole, kaj kiu, baziĝante sur principoj filozofiaj, estas kvalite pli bona ol la konataj lingvoj.

Por alirebligi la ekspozicion trans-regione, oni enretigis virtualan version, kiu montras ĉiujn ekspoziciajn objektojn. Ĉi tie krome prezentiĝas aŭdekzemploj en Volapŭk kaj Esperanto en formo teksta kaj kanta, same kiel intervjuo kun Irmi kaj Reinhard Haupenthal. Ĉi lasta informas pri ties plan-lingva kolekto kaj ilia engaĝiĝo kiel eldonistino kaj tradukisto.

Por doni okazon science pritrakti la temojn starigitajn de la ekspozicio, BŠB la 15an de junio 2012 aranĝis simpozion, kiu kun pli ol 70 parto-prenantoj renkontis viglan intereson. Okazis kvin prelegoj. La unuaj du estis dediĉitaj al la inventintoj de Volapŭk kaj Esperanto resp. al la historia evoluo de iliaj lingvo-projektoj. Reinhard Haupenthal, fakulo sur la kampo volapŭkologio, kaj d-ro Ulrich Lins, Esperanto-historiisto, estis la prelegantoj. En la dua prelega bloko parolis Prof. Gerhard F. Strasser (Pennsylvania State University / Universitato Ludwig Maximilian, Munkeno) kaj Prof. Heiner Eichner (Universitato de Vieno) pri la historio de la artefaritaj lingvoj de la mez-epoko ĝis la 17a jar-cento resp. pri la lingvo-sciencia diskuto pri plan-lingvoj. Fine Kortega Konsilisto Mag. Herbert Mayer raportis pri la historio de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko, ambaŭ sub lia gvido.

Ĉi referaĵoj kune kun tiu de Reinhard Haupenthal ĉe la malfermo de la ekspozicio pri interlingvistiko same kiel selekta bibliografio estas presitaj en akompana volumo de la ekspozicio.

Laŭ komunikado de **BŠB**

GES-3: solenoj kaj distingoj

Dum la 3a Grandpolia Esperanto-Somero en Wągrowiec (Pollando), la plej gravaj eventoj ligitaj kun oficiala celebrado de la 125-jariĝo de Esperanto, okazis la 2an de julio 2012.

La urbestro de Wągrowiec Stanisław Wilczyński, kun akompano de Franciszek Witucki (prezidanto de EDE-PL) kaj Stanisław Rynduch (sekretario de Eŭropa EDE-Federacio), inaŭguris memorŝtonegon kun informtabulo, donacitan de Stanisław Rynduch okaze de la 125a jubileo de Esperanto. Ĉe la ŝtonego la okjara Olga Goncerzewicz deklamis la versaĵon *Estas mi esperantisto* de Julio Baghy.

Poste ĉe la muro de la domo en kiu situas la Esperanta Kultur-Centro, estis malkovrita tabulo de la sidejo de EDE-PL, kaj la skvaro antaŭ la domo estis solene nomita *Skvaro Ludoviko Zamenhof*.

La tri gravaj jubileaj eventoj ekestis danke al rimarkinda apogo de lokaj aŭtoritatoj de la urbo kaj distrikto Wągrowiec.

Poste en lerneja aŭlo la solenaĵon daŭrigis Franciszek Witucki, legante salutvortojn de Jerzy Wenderlich, vicprezidanto de la Pollanda Sejmo, kaj Bojdar Leonov — prezidanto de la Bulgara Esperanto-Asocio. Poste li diris la nomojn de esperantistoj, distingitaj de la Pollanda prezidento Bronisław Komorowski, laŭ la iniciato de EDE-PL: **Józef Golec** per Kavalira Kruco de la Ordeno de Merito por Respubliko Pollando; **Ireneusz Wilczyński** per Ora Kruco de Merito; **Edward Jaśkiewicz** per Ora Kruco de Merito, kaj **Jerzy Antoni Walaszek** per Ora Kruco de Merito. La urbestro de Wągrowiec en sia parolado, interalie, esprimis sian kontenton pro la ekorganizado de la sekva GES.

Sekvis arta programo kiun komencis plia deklamado de Olga Goncerzewicz. La ĉefa arta programero de la solenaĵo estis monologo de Mario Migliucci *Doktoro Esperanto*, kortuŝe prezentita de Irena Grochowska.

En la arta programo prezentiĝis ankaŭ Instruista Koruso gvidata de Tomasz Kotwica, Wągrowiec-a *Bruss Quintet* kaj saksofona kvarteto de la ŝtata muziklernejo en Wągrowiec kaj la ensemblo *Grylewianki*. Vokalista minirecitalo de Antoni Walaszek, nomata la verda knabo el Sosnowiec, finis la artan programon.

Jerzy Antoni Walaszek

Ĉu vi jam estis en Mielno?

Esperantistoj el kelkaj landoj elektis Mielnon por sia tradicia Ĉebalta Esperanto-Printempo. En tiun ĉebaltan lokon, proksime de Koszalin, pli ol 80 esperantistoj venis la 12–23-an de junio ne nur por ripozi, sed ankaŭ por renkontiĝi kun novaj kaj malnovaj ŝatantoj de “Mielna printempo” dum la 34a ĈEP. Ĝuste antaŭ 125 jaroj Zamenhof donacis al la homaro ilon por komuna kaj facila interkompreniĝo. Amikeco kaj interkompreniĝo regis ankaŭ en Mielno.

Mielno gastigis ĉi-jare ne nur najbarojn el Germanio, Belarusio, Litovio, sed ankaŭ el Hispanio, Italio kaj malproksima Brazilo.

Krom ripozado kaj sunbruniĝado oni aŭskultis interesajn prelegojn pri brazilaj manĝaĵoj, litovaj kutimoj, kaj modernaj iloj en instruado de Esperanto. Kiel ĉiam oni povis vidi interesajn filmojn de Roman Dobrzyński kaj praktiki la lingvon dum diversnivelaĵoj kursoj.

Grandan intereson elvokis kurso por komencantoj gvidita de la juna brazilano Marlon Ribeiro. Gramatikajn sekretojn malkovris al partoprenantoj la kurso preparita de la prezidanto de la Esperanto-klubo en Koszalin — Czesław Baranowski.

Neforgeseblajn travivaĵojn lasis la itala kantisto-esperantisto Emanuele Rovere. Liaj kantoj kaj ebleco aĉeti liajn novajn diskojn estis granda evento dum nia restado en Mielno.

Tradiciaj posttagmanĝaj komunaj kantoj gvidataj de Ula Giercarz, vesperaj dancoj kaj kantoj ĉe bivakfajro, gimnastikado laŭ Tai-Ĉi metodo tre plaĉis al partoprenantoj. Ĉi-jare vespere amantoj de futbalo povis rigardi sur granda ekrano matĉojn de la futbala *Eŭro 2012*.

Adiaŭante Mielnon multaj promesis veni venontjare por la jubilea 35a ĈEP. Se vi ankoraŭ ne estis en Mielno kaj ne konatiĝis kun ĝia atmosfero, kaptu la okazon kaj partoprenu ĝin.

Stanisław Mandrak

Nova skvaro Zamenhof en Wągrowiec



Vivu la stel'!

La esperantistoj de la sud-pollanda urbo Nowy Sącz festis la jubilean tagon de Esperanto en la urba centro de kulturo, kie dum pli ol duono da jarcento agas Esperanto-klubo, organizante konstantajn kursojn de Esperanto, prelegojn, koncertojn, kongresojn, integrigajn aranĝojn...

Dum la duhora koncerto prezentis programon tri junularaj ensembloj: la kanta grupo *Junaj Voĉoj* kun esperantlingva repertuaro kaj solistoj en la lingvoj angla, franca, pola; la lerta knaba dancgrupo *Breakdance*, kaj la kortuŝaj dancistinoj *Katharsis* kiuj montris la venkon de la Bono en batalo kontraŭ la Malbono.

Meze de la arta programo okazis, gvidita de Jolanta Kieres kaj Ela Pachoń, kvizo pri Esperanto, bazita sur 25 lecionoj, montritaj dum pli ol dudek tagoj en la grava regiona retejo *Sądeczanin*. La 25 venkintoj de la konkurso ricevis ekzemplerojn de *La Unua Libro* represita de BES en Bjalistoko.

La prezidanto de la urba konsilantaro Jerzy Wituszyński, mem konanta Esperanton kaj partopreninta tri UK-ojn kun sia familio, venis al nia festo kun ok siaj familianoj kaj donacis al la esperantistoj belan gravuraĵon — arĝento sur glaso, kun gratulaj vortoj gravuritaj pole kaj Esperante.

Tre korajn bondezirojn, gratulleton kaj grandegan bukedon enmanigis estraraninoj de la Sonĉa universitato de la tria aĝo, kun kiu la Esperanto-klubo kunlaboras jam dum ok jaroj. Specialan dankon ricevis Jolanta Kieres el la organizaĵo “Radikoj kaj Flugiloj”, kiu en la baza lernejo de la vilaĝo Rdziosłów instruas Esperanton kaj preparas lernantojn al vojevodiaj konkursoj en Krakovo, en kiuj dum la lastaj kvar jaroj ŝiaj lernantoj ricevis premiojn pro arta programero en Esperanto.

En la vespera programo estis rakonto pri la unua lernolibro kaj ĝia kreinto, pri la valoro de la lingvo kaj amikigaj ecoj en ĝi, kiuj helpas al Esperanto ekzisti jam 125 jarojn.

La festo finiĝis gaje kaj dolĉe: grandega, kelketaĝa torto ornamita per jubileaj simboloj — donaco de la kukejo *Szarlotka* pro la Esperanto-instruado de filino de la mastro — estis disdividita inter la partoprenantoj kun tosto kaj la kanto *Vivu la stel'*, komencita de junaj knabinoj kaj poste kantita de ĉiuj gastoj!

Halina Komar

Ludoviko ree en sia naskiĝurbo

La 26an de julio en la Esperanto-Kafejo en Bjalistoko, Ludoviko Zamenhof mem promociis sian Unuan Libron reeldonitan okaze de la 125-jariĝo de la unua eldono.

Lia sekretario Konrado amuze prezentis sian Majstron kaj lian verkon. Zamenhof respondis demandojn de partoprenantoj kaj poste disdonis 100 ekzemplerojn de sia libro. La partoprenantoj plenigis deklarojn lerni Esperanton. Dek el ili ricevis de Ludoviko memormonerojn.

Estis anoncita la tria okazigo de la literatura konkurso pri prozo *Miaj fascinoj pri Esperanto*. Dum la prezentado de Esperantaj lernolibroj multaj personoj ricevis CD *Esperanto*. Kelkaj diris, ke ili iam lernis Esperanton kaj nun planas reveni al la Esperanto-agado.

Ege sukcesa estis nia ago “Ni dividu librojn inter ni”. Sur grandaj tabloj ni ekproponis al preterpasantoj senpage 1743 librojn en diversaj lingvoj. Homoj alportis sakojn plenaj da libroj por lasi ilin kaj preni aliajn. Ĉe la fino restis nur kelkaj, vere malinteresaj.

Lokaj amaskomunikiloj afable raportis pri nia agado.

La aranĝon partoprenis Maria Morawska el la Muzeo ĉe Wola en Varsovio kaj ĵurnalisto Roman Dobrzyński. Meze de la novembro 2012 en la Varsovia muzeo estos malfermita ekspozicio “Zamenhof en Varsovio”. Bjalistokanoj subtenos la organizantinon per diversaj materialoj. La bjalistokano Ludoviko Zamenhof kaj la direktoro de la Podlaĥia Libraro estos honoraj gastoj dum la malfermo de la ekspozicio. Ĉi-okaze probable okazos historia renkontiĝo post multaj jaroj de la avo kaj de la nepo Zamenhof.

Ela Karczewska

Jubilea festo en Olsztyn

Esperantistoj el Olsztyn (Olštino, la ĉefurbo de la regiono Varmio kaj Mazurio en la nord-orienta Pollando) festis la 125an jubileon de Esperanto de la 5a ĝis la 10a de julio 2012 en la Olštinaj Tagoj de Esperanto (OTE).

Ĉi-jara aranĝo daŭrigis la tradicion de la eventoj, kiujn organizis esperantistoj en Olsztyn dum lastaj jaroj. Tamen ĉi-jare la nomo kaj formo de aranĝo estis tute alia. Ĝi havis kulturalan kaj sciencan karakteron kaj rilatis al du gravaj eventoj: la 125-jara jubileo de Esperanto kaj la 70a mortdato de Lidia Zamenhof.



Ludoviko estas kontenta pri la 125-jariĝo de sia *Unua Libro* (Fotis Marta Wierzbowska)

Partoprenis 50 geesperantistoj el Aŭstrio, Belarusio, Danlando, Germanio, Litovio, Nederlando kaj el diversaj regionoj de Pollando. Ili loĝis en studenta domo en la Olština universitata kvar-talo Kortowo.

La inaŭguro okazis en la urba kulturcentro kun esperantistoj kaj invititaj gastoj. Dum la oficiala parto informon pri Jubilea Jaro kaj la programon de Olštinaj Tagoj de Esperanto prezentis la prezidantino de la Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj (VMSE) Elizabeta Frenszkowska (Esperante) kaj la vicprezidanto de VMSE Andreo Gielert (pole). Post tralego de salutvortoj, kiuj venis de multaj esperantistoj, la kunvenintojn alparolis la vicurbestrino de Olsztyn, kiu tralegis gratulleteron de la urbestro Piotr Grzymowicz, direktoro de la urba kulturcentro, estrino de la kulturfako de la urba oficejo, kaj alilandaj esperantistoj. Post la oficiala parto Helena Biskup prezentis la dramon de Mario Migliucci *Doktoro Zamenhof*.

La ĉefa programero de OTE estis simpozio “Kultura kaj mondkoncepta diverseco de Esperanta ideo”, dum kiu prelegis: Anneke Schouten-Buijs el Nederlando pri “Mondunuigaj instruoj de la Bahaa Kredo”, Andreo Gielert el Olsztyn kaj Agnieszka Szopińska el Nacia Spiritita Societo de Bahaanoj en Pollando pri “Lidia Zamenhof — esperantistino kaj bahaanino”. Roman Dobrzyński prezentis sian filmon pri la Bahaa Kredo *Ŝafejo de la Naŭa Profeto*. Okazis ankaŭ vespero dediĉita al Lidia Zamenhof kaj ekskurso al iama nazia koncentrejo en Treblinka, kie Lidia estis mortigita.

Krom tio dum OTE okazis prelegoj pri diversaj temoj ligitaj kun Olštino aŭ Esperanto. La simpozio kaj prelegoj okazis en la konferencujo de la Varmia-Mazuria Universitato. Roman Dobrzyński prezentis alian sian filmon *Japana printempo*. Oomoto 2009 kaj rakontis pri sia restado en Japanio.

Kadre de la aranĝo okazis du ekspozicioj kaj prezentadoj de Esperantaj libroj — de Krzysztof Śliwiński el Varsovio pri kultura kaj mondkoncepta diverseco de la Esperanta ideo, kaj de Esperantaj libroj kaj publikaĵoj el la Esperanto-libraro en Bjalistoko preparita de esperantistinoj el tiu ĉi urbo.

La partoprenantoj ekkonis turismajn kaj kulturajn valorojn de Olsztyn, promenante en la Olština malnova urboparto kaj vizitante Muzeon de Varmio kaj Mazurio en la Olština kastelo. Ili ankaŭ veturis al la apudolština arbarĝardeno en Kudypy, kie kreskas la arbo Lariko Ludoviko, plantita tie okaze de la 150a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. En la modernigita Olština planetario oni spektis novan programon.

Partoprenantoj de OTE povis kontroli propran scion pri Esperanto, pri la Esperanta movado kaj pri Olsztyn dum konkurso. Ĉiuj bonege amuziĝis dum pikniko kun fajro ĉe lago, kantante Esperantajn kantojn kaj manĝante diversajn pladojn.

La organizantoj esperas, ke la Olštinaj Tagoj sukcesis kaj plaĉis al ĉiuj partoprenantoj. Ni esperas, ke ili bone rememoros la tagojn, kiujn ili pasigis en Olsztyn.

**Elizabeta Frenszkowska,
Adam Frenszkowski**

BET-48: Malgranda sed amika

La 48aj Baltiaj Esperanto Tagoj okazis la 4–8an de julio en Pala, Estonio kun 44 esperantistoj el dek landoj. Nian renkontiĝon salutis loka komunumestro Esperante.

Kadre de BET-48 okazis Interlingvistika konferenco omaĝe al la 70-jariĝo de la slavisto kaj interlingvisto prof. Aleksandr Duliĉenko. La konferencon gvidis Madis Linnamägi el Tartu kaj la studoj aperos en la deka volumo de la universitata serio *Interlinguistica Tartuensis*. Inter la prelegantoj estis profesoro Duliĉenko, kiu konatigis siajn multnombrajn sciencajn eldonaĵojn.

Okazis en Pala tradiciaj programeroj: kursoj por komencantoj, koncerto kaj ekskursoj. Je nia dispono estis ejoj de loka lernejo.

Por konservi ekvilibron inter la serioza kaj amuza partoj, antaŭtagmeze estis ebleco aŭskulti prelegojn, post tagmanĝo atendis nin aŭtobuso por ekskursoj. La nacian vesperon plenigis dancoj kaj kantoj de loka folkloro ensemblo.

Kvankam la nombro da partoprenantoj ne estis granda, la kvalito de la preleĝoj pro tio ne suferis. Kontraŭe, kelkaj raraj aŭ malpli raraj gastoj de Estonio, kiel Giorgio Silfer, Brian Moon, Michael Cwik kaj aliaj parolis interese, kaŭzante viglan diskuton. La paroladoj de Claude Nourmont estis kuraĝigaj kaj optimismaj.

Unu el la ekskursoj estis al la muzeo de estona klasikulo, poeto Juhan Liiv, kie okazis komuna deklamado de liaj esperantigitaj versaĵoj el la libro *Al abelujo ĝi flugas*. Dum alia ekskurso ni rigardis ĵus renovigitan kastelon de Alatskivi kaj poste vizitis muzeon kaj preĝejon de malnovrita rusortodoksa eklezio. Jam pli ol tricent jarojn ili loĝas en kelkaj vilaĝoj en tiu regiono. Kun la historio de la rusortodoksa kristanismo kaj kun la malnovritana kulturo en Estonio nin konatigis Pavel Varunin.

Baltiaj renkontiĝoj estas kvazaŭ kunvenoj de amikoj. Bedaŭrinde, lastatempe niaj vicoj maldensiĝas kaj la plej doloriga problemoj plu restas varbado de novaj membroj. Almenaŭ ĝis nun ni sukcesis konservi pozitivan fonon por Esperanto, kaj oni rilatas al ni amike. Se en diversaj novaĵ-elsendoj ni aŭdas ĉefe pri konfliktoj kaj katastrofoj, sciigoj pri esperantistaj renkontiĝoj estas kvazaŭ pozitiva kontrasto al ili. Nian agadon reĉhis loka radio.

Tõnu Hirsik

NASK: Denove mallonga intensa

Post la sukcesa septaga intensa programo en 2011, la organizantoj de la 43a NASK (Nordamerika Somera Kursaro de Esperanto) decidis aldoni unu plian tagon kaj starigi la kursaron ekde la 25a de junio ĝis la 4a de julio 2012 en la pli centra Usona ŝtato, Teksaso. Ni ricevis inviton okazigi la programon ĉe la Universitato de Teksaso en Dalaso, tuj je la fino de la Usona Esperanto-Kongreso samloke. Tiel kongresanoj kiuj volis perfektigi sian parolkapablon en Esperanto (kaj ŝpari vojaĝkostojn!) povis resti en la sama moderna loĝejo kaj facile iĝi studentoj de NASK. Multaj tion faris kaj troviĝis inter la 36 partoprenintoj de la tri-nivela kursaro.



La internacia instruista teamo konsistis el Spomenka Štimec de Kroatio, Tim Westover de Usono kaj Birke Dockhorn de Germanujo. Bertilo Wennergren de Svedujo aldonis siajn talentojn por kelkaj tagoj kaj Hoss Firooznia de Usono gvidis la eksterklasajn aktivojn kaj redaktis la tagĵurnalon *La NASKa Fasko*.

Multaj talentuloj troviĝis inter la partoprenintoj el 13 usonaj ŝtatoj kaj ses pliaj landoj. Ili kontribuis al la diversaj prezentaĵoj dum la posttagmezaj kaj vesperaj programeroj: muziko, sportoj de ĉasanto de tornadoj, geologia klarigo pri nekutimaj rokformoj, kiel krei per balonoj, kantado, malicaj komputilaj programoj, kaj similaj. Mabel Isabel Ojeda montris filmojn de Argentino kiel allogaĵojn por la UK en 2014.

La intensa oktaga kursaro finiĝis per disdono de atestiloj kaj festeto. Ni esperas fari similan aranĝon kadre de la Usona Esperanto-Kongreso en 2013, verŝajne ĉe universitato en Norda Karolino.

Ellen M. Eddy
administranto de NASK

La 18a IMEK sukcesis

La 18a Internacia Medicinista Esperanto Kongreso efektiviĝis la 10–15an de julio 2012 en Opava, iama centro de Ĉeĥa Silezio.

La kongreson okazigis UMEA, al kiu aliĝis Jagiellona Universitato, Farmakologia Instituto de Pola Akademio de Sciencoj en Krakovo kaj la Silezia Universitato en Opava, kies rektoro, prof. Žáček akceptis la honoran protekton. La organizan flankon de la kongreso plenumis membroj de la loka Esperanto Klubo, kiu aktivas en la kadro de la tradicia regiona societo Matice Slezská.

La ĉeftemo de la kongreso estis “Depresio — minaco de la 21a jarcento”, tamen oni diskutis ankaŭ aliajn gravajn problemojn, inter kiuj rehabilitado kaj ĝia rolo en la moderna medicino, rolo de vitaminoj kaj kemiaj bioelementoj ĉe kuracado, flankaj efikoj de trouzado de medikamentoj ktp. La kongreson ĉeestis kvindek da fakuloj el sep landoj, Estis prezentitaj pli ol dudek fakaj kontribuajtoj en Esperanto kaj en la angla. Ĉiuj — ankaŭ kelkaj aliaj senditaj nur skriboforme — estas resumitaj en la 88-paĝa kongreslibro. En la fakan programon estis envicigita ankaŭ komenca kurso de Yumeiho-masaĝo, kaj sukcesaj frekventintoj ricevis diplomon.

La kongreson krom la ĝisnuna UMEA prezidanto, d-ro Imre Ferenczy, inaŭguris la urbestro de Opava, prof. Zdeněk Jirásek, vicrektorino de Silezia Universitato en Opava d-rino Radmila Dluhošová kaj kelkaj aliaj gastoj. Inter la partoprenantoj estis konataj personoj el la medicinista mondo, kaj funkciuloj de UMEA, inkluzive de MUDr. Eva Kopečná el Opava, kiu por la venontaj du jaroj provizore transprenis rolon de UMEA prezidantino pro la rezigno de ĝia ĝisnuna meritplena prezidanto Ferenczy.

La organizantoj preparis por la kongresanoj tutagan ekskurson al la urbo Jeseník kun konata banloko Gräffenberg kaj viziton de la firmao TEVA, unu el la plej gravaj produktantoj de medikamentoj en Ĉeĥio. La kulturano parton de la renkontiĝo plenumis Georgo Handzlik kaj Saša Pilipoviĉ; distriĝi oni povis dum la konatiĝa kaj adiaŭa vesperoj, ambaŭ kun viva muziko.

La 18a IMEK ĉiuflanke sukcesis kaj aparte en faka medio — ne nur en Opava — ĝi kontribuis al prestiĝo de nia movado.

Vlastimil Kočvara



RA denove ĉe Bajkalo

La trian fojon ĉe la lago Bajkalo okazis Renkontiĝo de Amikoj (RA). Jam la sepa laŭvice. Ĝin partoprenis 39 esperantistoj el 12 urboj de Ruslando. Plejparte, oni venis por ĝui la sovaĝan naturon de la Bajkala regiono.

Dum la renkontiĝo estis artaj metiĝoj, amuzaj dancoj, voĉ-trejnadoj kaj lernado de Esperanto-kantoj. Ni piedmarŝis apud la ripozejo kaj kuraĝis naĝi en la lago. Ni vizitis muzeojn kaj ekskursis. Por komencantoj kaj progresantoj okazis ĉiutagaj Esperanto-kursoj.

Tre bone prezentis sin la grupo el Ĉeboksari. Ili alportis vestaĵojn el Ĉuvaŝio, fotojn de sia urbo, aktive teatrumis kaj partoprenis la programon de RA-7.

Multaj partoprenantoj ricevis diplomojn kaj medalojn pro sia aktiveco: Nikolao Neĉaev — la plej romantika poeto, Jelena Jaroŝenko — la plej sportema virino (Malgraŭ sia aĝo ŝi piedmarŝis 16 km laŭ la montaro), Irina Romanova — la plej ĉarma dancgvidanto. La diplomon de Sinjorino Angara ricevis Natalja Platonova kaj Sinjoro Bajkalo iĝis Vladimir Kostjunin.

Kiel ĉiam la etoso estis bonega kaj ni nepre renkontiĝu sekvontjare. RA-8 estas planata en Krimeo (Ukrainio).

Katerina Arbekova

IJS en perfekta loko

Internacia Junulara Semajno (IJS) okazas ĉiusomere kaj estas la plej granda renkontiĝo de Hungara Esperanto-Junularo (HEJ). Ĉi-jare estis la 23a fojo kun kvindek da partoprenantoj el 15 landoj. La vilaĝo Nőtincs, kie okazis la renkontiĝo, havas preskaŭ 1300 loĝantojn kaj troviĝas ĉirkaŭ 50 kilometrojn for de Budapeŝto.

La kunvenejo “Nenie-insulo Travivajparko” estis perfekta elekto: parko kun bestoĝardeno, propra arbara teritorio, ludplaco, scenejo kaj multaj lokoj por babilado kaj amuzado. Tie troviĝis ankaŭ ĉevalejo kiun rajdemuloj povis uzi kontraŭ eta pago. Ni dormis en lignaj dometoj ligitaj per pontetoj.

La programo estis ege varia. Ĉiun tagon malfermis matena gimnastiko. La sekva konstanta punkto estis kursoj de Esperanto por diversaj niveloj. Ni ankaŭ havis la eblecon lerni la hungaran, la nederlandan, la katalunan, la latinan kaj la 123-vortan tokiponon. Malgraŭ la belega vetero lernantoj ne mankis.

Ĵaŭde okazis tuttaga ekskurso al la proksima urbo Vác. Ni promenadis tra la urbo aŭskultante rakontojn de la gvidantino. Posttagmeze ni komencis akvobatalon! Ĝi estas kutima dum IJS, sed ĉi-jare okazis sen ĉeesto de fajrobrigado kiu ŝprucigintus akvon, tamen estis amuzege! Ni batalis ĉe urbocentra fontano ĝis la lasta seka fadeno en niaj vestaĵoj.

Dum la sama tago, post vespermanĝo, oni anoncis serĉadon de specialaj monbiletoj “IJS-mono”, kaŝitaj en strangaj lokoj en nia loĝteritorio. Post la kolektado ni povis pliriĉiĝi ludante en kazino. La monon ni uzis la sekvan tagon dum la aŭkcio. Tie estis multe da donacoj (libroj kaj eksterordinaraj, amuzaj objektoj ofte ligitaj kun Esperanto).

Ceteraj interesaĵoj dum tiu tempo estis koncertoj de Stefo Schneider kaj JoMo, popoldanckurso, kurso de ĵonglado, komuna kantado, vingustumado. Ĉiutage okazis “nokta universitato” dum kiu oni povis diskuti diversajn temojn. Ĉe la IJS-ejo troviĝis lago al kiu ni volonte promenadis por plaĝumi, naĝi kaj amuziĝi. Aparte de la programo okazis urborigardado de Budapeŝto.

Marta Wierzbowska

Unufraze

★ Vicprezidantino de EEU Flory Witdoeckt partoprenis konferencon de la Eŭropa Komisiono “Renkonten al demokratia fondaĵo de Eŭropa Nova Ekonomia kaj Financa Ordo”, kiu okazis 28 jun en Bruselo. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Eo estis aprobata de Ministerio de Turismo de Brazilo kiel laborlingvo, k Laura Pereira de Alcântara (Rio-de-Ĵaneiro) estas la unua brazila profesiulo, kiu havas la E-flagon sur sia identigilo de turisma gvidisto. (Fabiano Henrique)

★ En julio sur grandaj ekranoj en Vienaj metroo-stacioj videblis du bildoj: la unua kun la E-jubilea simbolo k “125 jaroj de Esperanto — Saluton”, k la dua kun foto de Zamenhof k la teksto “Tiel oni salutas en la pontlingvo kreita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĝi interligigas homojn de ĉiuj gepatraj lingvoj. Ankaŭ en Vieno ekzistas Esperanto-asocio”. (Landa Agado)

★ Sojle de la aprobo de parlamenta leĝpropono, kiu enkondukos la opcian instruadon de Eo en brazilaj mezlernejoj, Federacia Universitato de Brazilo UnB, oficiale aldonis Eon al siaj 12 instruataj lingvoj. (Josias Barboza)

★ 26 jul en la Nacia Biblioteko de Armenio okazis aranĝo dediĉita al la 125-jariĝo de Eo kun prelego, ekspozicio k koncerto en ĉeesto de pluraj ĵurnalistoj. (Landa Agado)

★ Mindaugas Žuromskas k Gediminas Degėsys prizorgis la E-fakon ĉe la stando de la Esplora Instituto de Litova Kulturo en la 13a Internacia Librofoiro en Vilno. (G. D.)

★ E-stando estis aranĝita ĉe la tradicia konferenco de la Alternative Educational Resource Organization (AERO), kiu okazis 1-5 aŭg 2012 en la Usona urbo Portlando. (John Dale)

★ La Komitato de UEA elektis du novajn honorajn membrojn de UEA: Hori Jasuo el Japanio k Georgo Nanovszky el Hungario. (GK UEA)

★ La Estraro de Fondumo Esperanto (Finnlando) decidis doni al Sylvia Hämäläinen premion de mil eŭroj pro la verkita de ŝi historio de la E-Ligo de Finnaj Instruistoj. (*Esperanta Finnlando*)

★ D-roj Esther Schor (profesoro k vicestro de la fako pri la angla lingvo en Universitato Princeton) k Sho Konishi (docento en la historia fakultato k en la lernejo pri interdisciplinaj studoj de Universitato Oksfordo) iĝis membroj de la Konsilantaro de Esperantic Studies Foundation. (ESF)

Transiri tiun damnindan verdan abismon!

La kvara artikolo de Dennis Keefe

Dum pli ol kvindek jaroj sociologoj kaj psikologoj starigadis la Teorion de la Disvastiĝo de Novaĵoj. Tiu teorio provas priskribi kaj klarigi, kiel novaj varoj, metodoj kaj ideoj estas nur iomete post iomete akceptataj de homoj.

En [mia unua artikolo](#) pri la ĉi tiu teorio (*LOdE*, 2012, №4), mi prezentis la ĉefajn ideojn de Everett Rogers, la plej sperta fakulo pri tiu teorio. Rogers asertas, ke estas kvin subgrupoj da homoj kiuj reagis malsimile al novaj ideoj: Grupo I (novigantoj), Grupo II (fruaj akceptantoj), Grupo III (frua plimulto), Grupo IV (malfrua plimulto) kaj Grupo V (postrestantoj).

La akceptado de novaj ideoj trapasas tiujn kvin grupojn laŭorde, unu post la alia. Alivorte, homoj de Grupo II ne akceptas novan ideon se ili antaŭe ne vidas homojn de Grupo I utiligantajn la ideojn. Do, en la 1990aj jaroj estis homoj kiuj volonte ekuzis poŝtelefonojn (Grupo I), kaj estis homoj (Grupo II) kiuj aĉetis poŝtelefonon nur post kiam ili vidis sufiĉe da aliaj homoj utiligantaj tiajn telefonojn. Kaj la lasta Grupo V akceptos iun novan ideon, nur se ili estas devigataj akcepti ĝin. Oni povas diri, ke anoj de la Grupo V aĉetos veturilon aŭ komencos veturi per buso nur post la malapero aŭ malpermeso de la lasta ĉevalo sur la strato!

En [mia dua artikolo](#) (*LOdE*, 2012, №5), mi listigis kelkajn trajtojn de novaĵoj (varoj, ideoj, metodoj) kiuj helpas al tiuj aĵoj plivastiĝi pli rapide. Ekzemple, se la varo estas perceptata kiel pli simpla, ĝi disvastiĝas pli rapide. Se la varo videblas facile, ĝi pli rapide disvastiĝas, kaj tiel plu. Do poŝtelefono mem pli rapide disvastiĝis ol iu servo ene de la poŝtelefono, kiu ne videblas.

Estas probable, ke la Teorio de Rogers multflanke aplikblas al Esperanto. Ĝi povas aplikiĝi al la ĝenerala, lingva nivelo, tio estas, ĉu la lingvo Esperanto akiras pli kaj pli da parolantoj aŭ ne. La teorio ankaŭ povas utiliĝi ĉe parta analizo. Ekzemple, en junio okazis granda KER-ekzameno en la komunumo Esperanto. La unuaj ekzamenitoj probable kundividas psikologiajn trajtojn de la Grupo I. Sen rigardi la statistikojn, mi aŭdacus diri, ke komence estis ege malmulte da homoj kiuj volis ekzameniĝi, poste estis pli kaj pli. Homoj de Grupo II, nur “vidinte” aliajn homojn ekzameniĝi, ekvolis fari simile.

Sed la Teorio de la Disvastiĝo havas problemojn. Spite al la multnombraj sciencaj studoj kaj eble 1000 doktoraj disertaĵoj pri la temo, Rogers avertas nin pri la baza problemoj de tiaj esploroj: preskaŭ ĉiuj esploris nur jamajn sukcesojn. Sciencistoj plejparte trarigardis novajn varojn kaj ideojn nur post la fina, sukcesa disvolviĝo, do nur post la tuta procezo I, II, III, IV kaj V. Sed por ĉiu nova varo, kiom da ili plene sukcesas? Laŭ Phillip Kotler, aŭtoro de multaj libroj pri merkato, ĝis 95% de novaj varoj malsukcesas post lanĉo sur la merkato. Tiuj novaĵoj trapasas nur fazojn I kaj, eventuale, II.

Ĉu Esperanto estas sukcesa ideo kiu trapasis almenaŭ fazojn I, II kaj III, do 2.5%, 13.5% kaj 34%, aŭ entute 50% el


la koncerna loĝantaro? Aŭ ĉu Esperanto estas ankoraŭ en la fru-disvolviĝa fazo nomata Grupo I? Eventuale, en Grupo II? Kaj eble nia lingvo ĉiam tie restos kaj mortos? Ĉar probable neniu sciencisto kaj esploristo konsiderus Esperanton kiel sukcesintan ideon, mankas al ni esplorado kaj informado, kiu prilumas la vojon por disvolviĝo el la fazo Grupo II en tiun de Grupo III kaj poste. Ja la grandaj nombroj de uzantoj troviĝas nur post Grupo II. Grupoj I kaj II estas pioniroj, exploremaj homoj, aventuremaj kaj mense malfermataj homoj kiuj facile akceptas novajn ideojn, kaj tiuj de Grupoj III, IV kaj V, 84% el nia loĝantaro, estas homoj kiuj akceptas ideojn nur kiam tiu ideo plene montras, ke ĝi estas praktika, tuj utiligebla, profitdona, kaj ĉiel kontentiga.

Pri tiu manka parto de la Teorio de Rogers donas kelkajn ideojn Geoffrey Moore. Moore laboris dum jaroj kun firmaoj en la fama Silikona Valo en Kalifornio. Tie li observadis la lanĉon kaj falon de multaj altteknologiaj produktoj. Moore starigis al si la demandon: kial kelkaj varoj, la minoritato, sukcesis, kaj kial aliaj varoj, la majoritato plene malsukcesis, malaperinte por ĉiam eĉ se tiuj varoj estis plenplenaj je avantaĝoj?

Kun sperto de konsilisto de altteknologiaj kompanioj de Kalifornio, Moore verkis du sukcesajn librojn *Crossing the Chasm* (Transirante la abismon), kaj *Inside the Tornado* (En la koro de tornado). Estas en tiuj du verkoj klarigoj: kial multe da novaj produktoj povas lanĉiĝi sukcese en la fazoj Grupo I kaj Grupo II, sed ne transiras en la fazojn, kie troviĝas ne nur la plejparto de eventualaj klientoj, sed la klientoj kiuj havas la monon por ekaĉeti kaj la budĝeton por daŭre utiliĝi la novajn ideojn.

La nocio “Transirante la abismon” estas la kerno de la samtitola libro. La ideo esence estas, ke post sukcesa lanĉo en la merkato de nova varo, speciale teknologia varo, homoj de Grupo I kaj Grupo II ofte entuziasme akceptas la varon, sed la homoj de Grupo III plejparte rifuzas ĝin. Tio kreas rapide kreskantajn vendojn en la unua kaj dua fazoj (danke al Grupoj I kaj II), kaj malkreskantajn vendojn tuj poste. Fakte, la varo malaperas baldaŭ poste pro nevendado: Grupoj I kaj II jam aĉetis, sed Grupo III rifuzas aĉeti. Jen la profunda abismo, la barilo kaj la morto de tiu produkto. Do, anstataŭ havi novaĵon kiu sukcese trapasas la kvin fazojn, ni havas novaĵon kiu frue mortas ĉe la fino de fazo 2.

Kvankam la ideoj de Geoffrey Moore plejparte rilatas



novajn altteknologiajn varojn de la Silikona Valo, la situacio en Esperantujo estas simila: entuziasmaj kaj aventuremaj homoj fiere alproprigas la novan lingvon, dum la plejparto de la homoj rifuzas ĝin, ĉar ili ne vidas, kiel tiu lingvo povas servi ilin **nun**. Estas profunda abismo inter idealistoj kaj praktikaj homoj.

Moore asertas, ke por transsalti la abismon, oni devas scii, ke la homoj de la Grupo III fundamente malsimilas tiujn de la Grupoj I kaj II. Ano de la Grupo III ne pensas pri morgaŭ, li pensas pri nun. Li ne pensas pri idealoj; li pensas pri realeco. Li ne pensas pri semoj; li volas vidi plukopretajn frukto-arbojn. Ne sufiĉas al li diri, ke via ideo estas bona **se...** Vi devas diri, ke via ideo nun donos al li profiton, nun kapablas malplialtigi liajn kostojn, kaj nun havas konkretajn, videblajn, palpeblajn, jam montritajn avantaĝojn. La Grupo III volas vidi pruvojn, ke tiu nova ideo jam vere funkcias, kaj jam funkcias bone, kaj jam funkcias senriske — finance, socie kaj psikologie.

Tio verŝajne validas ankaŭ por Esperanto. Ja estas homoj, kiuj entuziasme lernas la lingvon, eĉ se tio ne donas tujan profiton, sed la plejparto de nia mondo volas vidi avantaĝojn nun, se ili investas tempon kaj monon por fari ion novan. Tiuj homoj, kiuj staras ĉe la alia flanko de la granda barilo, estas praktikaj homoj, sed esperantistoj estas plejparte idealistoj. Alivorte, esperantistoj troviĝas cis-montare; Grupo III loĝas transmontare. Tiu montaro, tiu barilo, tiu abismo estas impone granda.

Idealistoj povas komenci movadon por antaŭenigi Esperanton, sed ege malfacile la movado disvastiĝos sen la ekpartopreno de la granda plimulto de la socio: la homoj de Grupo III, antaŭ ĉio, kaj poste, tiuj de Grupoj IV kaj V. Esperantistoj, la idealistoj, staras antaŭ socia, psikologia, komerca barilo. Kiel transsalti tiun barilon?

Por transiri la barilon inter Grupo II kaj Grupo III, la unua rekomendo de Moore estas eviti celi ĉiujn de tiu Grupo III. Celante ĉiujn, laŭ Moore, oni atingos nenion. Tiu baza rekomendo de Moore obeas la fundamentan principaron de merkato. Oni devas, anstataŭe, celumi tre limigitajn celgrupojn en Grupo III. La ŝlosilo estas trovi subgrupojn en Grupo III kiuj povas profiti de Esperanto **nun**, ne morgaŭ. Tiuj subgrupoj devas vidi kaj kompreni ĝuste, kiel Esperanto povas doni konkretajn avantaĝojn al ili nun.

Estus interese provi nomi tiajn subsegmentojn de Grupo III. Ĉiu interesgrupo (ŝakludistoj, vegetaranoj, ŝatantoj de Mikaelo Jackson), ĉiu asocio (Green Peace, bestoprotektantoj, kato-ŝatantoj), ĉiu urbo, ĉiu urbeto, ĉiu kvartalo (enmigrinta kvartalo), ĉiu klubo, ĉiu lernejo, ĉiu aĝotavolo (inter 3 kaj 4 jaroj, inter 80 kaj 85 jaroj), ĉiu religia subgrupo (Oomoto kaj 100 usonaj eklezioj), ĉiu socia klaso (senhavuloj, la nekredible riĉaj kiel Georgo Soros), ĉiu neesperanta lingvokomunumo (Parolantoj de la keĉua, maoria kaj de la cigana lingvoj), ĉiu fizikostatulo (blinda, muta, mensohandikapita, nelegkapabla, malrapidlernkapabla), ĉiu etna grupo (Navaja, Zunia, Seminola, indianoj de Usono), ĉiu firmao (IBM, Google, Apple, Ben kaj Jerry's) kaj ĉiu internacia portempa projekto (dekmiloj da tiuj projektoj kiuj kunlaboras nun). Estas probable dekmiloj, centmiloj da (sub)grupoj. Kaj estas eĉ pli da subgrupoj kiam oni prikonsideras, ke sukcesa subsegmentado povas utiligi samtempe plurajn el la supraj trajtoj. Ekzemple, la subgrupo de homoj kiuj aĝas pli ol 65 jarojn, kaj kiuj nun loĝas en kamparo en lando kie la angla lingvo estas malŝatata.

Kompreneble, la listigo de la subsegmentoj tute ne sufiĉos por starigi sukcesan strategion. Inter tiuj subgrupoj oni devas trovi ĝuste tiujn, kiuj povas jam **nun** sukcese utiligi Esperanton. Se estas la kategorio urbetoj, Herzberg la Esperanto-Urbo. Se estas religio, ekzemple, la bahaanoj. Se estas interesgrupoj, la vegetaranoj. Se estas lernejoj, la multaj lernejoj en Ĉinujo kiuj nun prikonsideras la utiligon de Esperanto por la kvinjaruloj.

Moore probable konsentas kun tia pensmaniero por transiri la barilon, por sukcesigi bonan ideon, kiu sen bona flegado, mortos en la fazo de Grupo I aŭ II. Sed Moore ankaŭ substrekos, ke estas nepre, ke oni proponu **kompletan**, ne partan, solvon al ĉiu individua celgrupo. La entuziasmuloj de la Grupoj I kaj II facile akceptas, ke la nova ideo ankoraŭ ne estas perfektigita. Tiaj homoj volonte aĉetis la unuajn telefonojn de antaŭ unu jarcento, akiris la unuajn aŭtomobilojn kvankam ili paneadis tre ofte. Tamen la praktikaj homoj de la Grupo III neniam alproprigos novan ideon, se antaŭ ili ne staras kompleta solvo. Kion tio signifas por Esperanto?

Por pli bone kompreni, kio estas kompleta solvo rilate la lingvon Esperanto, imagu jenan situacion: Morgaŭ matene UEA ricevas telefonaĵon de la direktoro pri trejnado de la firmao IBM. IBM klarigas al Osmo Buller, ke ili volas fari eksperimenton por vidi, ĉu Esperanto povas esti utiligata en kelkaj internaciaj kunlaboraj projektoj de IBM. Sinjoro Buller afable dankas al IBM pro la demando, kaj sendas al ili liston de ĉiuj Esperanto-kursoj en la tuta mondo por la venontaj 12 monatoj. La listo havos pli ol 200 kursojn, sed **neniu** el ili konvenos al IBM.

Kara leganto, legu plu.

IBM, kiu volas sendi 30 homojn el 20 landoj (Usono, Ĉinujo, Egiptio kaj similajn) por intensa kurso de **8 horoj ĉiutage dum 6 semajnoj** poste trovas, ke la listo de Osmo **ne havas eĉ unu kurson** en la tuta mondo kiu almenaŭ etete similas al la bezonoj de IBM. Por fari tian kurson, IBM devas sendi siajn homojn al la Esperanto-urbo Herzberg dum sep tagoj en februaro, poste al semajnfina kurseto ie en Hungario en marto, poste al speciala semajno en Grésillon en aprilo. Poste IBM sendos la lernantojn al Usono por 8-taga kurso ĉe universitato eble en San-Francisko, eble en Teksaso, ktp, ktp. Kaj en tiu kursaro ne troviĝas eĉ unu leciono pri komerco aŭ pri komputiloj aŭ pri organizado, tio estas, estas nenio pri la veraj bezonoj de IBM. IBM volas ne nur lerni Esperanton, ili volas ankaŭ utiligi ĝin por solvi komputilajn, komercajn kaj organizajn problemojn. Per ĉi tiu ekzemplo, oni povas klare vidi, ke la nuntempaj kursaj proponoj por la praktikaj homoj de Grupo III, kiuj volas kompletajn solvojn — ne idealistajn proponojn — tute ne taŭgas.

Ni povas konkludi, utiligante la Teorion de Moore kiel bazon, ke se esperantistoj volas eniri en la fazon III, priskribitan de Moore kaj Rogers, ili devas eble pensi multe pli malgrandskale kaj limigi siajn klopodojn al tre limigitaj kaj konkretaj celgrupoj, kiuj povas utiligi Esperanton **nun**. Samtempe, ni devas ie iam starigi **kompletajn** kursojn, kiuj ankaŭ respondas al specifaj bezonoj de tiuj limigitaj celgrupoj. Se tiuj du fundamentaj paŝoj, celado de tre specifaj grupoj kaj propono de kompleta solvo ne okazos, restas nur unu metodo kiu povas helpi: miraklo.

Ho, tiu damninda verda abismo!

Dennis Keefe

Universitato de Nankino, Ĉinujo



Artefarita Esperanto-stila Eŭropo

de Dafydd ab Iago

Verŝajne Herman Van Rompuy, la prezidanto de la Konsilio de la Eŭropa Unio (EU) ne scias multon pri la lingvo Esperanto. Van Rompuy, ĉiam bonintenca, certe neniam intencas ofendi, sed ja faris. Somere, li, aŭ almenaŭ liaj parolad-aŭtoroj, substrekis la neceson eviti “artefaritan Esperanto-stilan Eŭropon”.

“La plej granda problemo en Eŭropo nuntempe ne estas deficiito de demokratio. Neniam estis tiom da diskuto kaj voĉdonado pri la Unio. Eŭropa politiko fariĝis enlanda politiko”, — diris Van Rompuy somere en la belga urbeto Loveno. “La plej granda problemo estas deficiito de konvinko. Eŭropo ne plu povas esti neeviteblaĵo aŭ demando de destino, ĝi devas esti pozitiva projekto.”

Ĉio bona ĝis nun, sed Van Rompuy aldonis: “Eŭropo ne bezonas novan fundamentismon kun la celo engluti popolojn kaj naciojn en artefaritan Esperanto-stilan Eŭropon. Ankaŭ ĉi tie ni bezonas ekvilibron, ‘unuecon en diverseco’, ĉi-foje kun emfazo pri unueco”.

La negativaj vortoj de Van Rompuy aldoniĝas al tiuj de la Eŭropa Komisiono (EK), rifuzinta registradon de civitana iniciato — peticio kun la titolo *Rekomendu kantadon de la Eŭropa Himno en Esperanto*.

“La Komisiono konsideras, ke ne ekzistas leĝa bazo, kiu permesus proponon por leĝa akto en la formo de via iniciato, nome la establono kaj kantadon de la Eŭropa himno en Esperanto”, — skribis Catherine Day, ĝenerala sekretario de la Eŭropa Komisiono al Seán Ó Riain, prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

“Specife, se konsideri kiel leĝan bazon la Traktatan titolon pri kulturo, ĉi ties ĝenerala celo estas kontribui al la disvolvigo de la kulturoj de la Ŝtatoj-Membroj, — daŭrigis Day. — Ĝis la nuna momento ŝajnas, ke neniu Ŝtato-Membro igis la antaŭenigon de Esperanto parto de sia politiko pri kultura heredaĵo, kaj ĝi ankaŭ ne povas esti konsiderata parto de la komuna kultura heredaĵo”.

“Ĉu oni atendis ion alian?” — demandis sin la svisa esperantisto kaj interlingvisto Andreas Künzli en la retforumo de *Libera Folio*. — “Kial skandalo? Nenia skandalo! Sed tute normala afero kaj respondo. Ĉu oni ankoraŭ ne komprenis, ke lingvo, kiel Esperanto, kiu ne estas oficiala en EU, havas nenian signifon, povas ludi nenian rolon, kvazaŭ ĝi havas nenian ekzistoraĵon?” Künzli aldonas, ke se oni dirus kaj skribus cent aŭ milfoje la samon, certaj esperantistoj daŭre ne kredus kaj ripetus la samajn embarasajn agadojn.

La celoj de la civitana iniciato pri la Eŭropa himno, laŭ EEU, estis plifortigi la komunan Eŭropan identecon, la partoprenon de la civitanoj en la Eŭropa integriĝo, kaj sekurigi la samecon de respekto por ĉiuj Eŭropaj lingvoj. EEU havis en la komitato de subtenantoj por la iniciato subtenantojn, kiel nobelpremiito Reinhard Selten el Germanio kaj la konata politikisto Marco Pannella el Italio. Se la Eŭropa Komisiono akceptintus la proponon, EEU devus kolekti 1 milionon da subskriboj en la 27 EU-landoj por ebligi al la Eŭropa Komisiono konsideri tian leĝan proponon.

Vigla Schleyer-rezonado

En la julia *Ondo* (p. 13–15) la svisa esploristo Andreas Künzli plian fojon kompilis eldirojn de Zamenhof pri Schleyer. En sia bibliografieto li lasas sen mencio du pritemajn verkojn de Gonçalo Neves kaj de la subskribinto, kiuj ambaŭ traktis la rilatojn inter la du lingv-aŭtoroj kaj jam diris ĉion ĉi-rilatan.*

Künzli same lasas sen mencio aron da faktoj atestantaj pri tio, ke la personeco de Johann Martin Schleyer prezencas en la nun-tempa konscio. Jen la ĉefaj:

1. De 2001–2008 aktivis Prelato-Schleyer-Komitato (al kiu Künzli kelk-tempe apartenis). Sub ĝia aŭspicio

* Neves G. *Zamenhof kaj Volapük*. Bad Bellingen 2012; Hauptenthal R. *Pri la start-kondiĉoj de du plan-lingvoj*. 2a eld. Saarbrücken 2007.

okazis prelegoj, ekspozicioj, gazetaraj informoj kaj aliaj publik-rilataj laboroj, (re)eldono de verkoj de kaj pri Schleyer.

2. De junio ĝis septembro 2012 Bavara Ŝtata Biblioteko (BŠB) dediĉis ekspozicion i. a. al Schleyer/Volapük kaj kadre de simpozio prezentis prelegon sam-teman. En oktobro 2012 Martin-Schleyer-Gimnazio (Lauda-Königshofen) aranĝos solenaĵon honore al sia nom-doninto.

3. Ekzistas SVO (Schleyer-Volapük-Objektoj): Schleyer-stratoj en Oberlauda, Krumbach, Konstanz kaj Litzelstetten; tabulo kaj busto en Oberlauda, tabuloj en Konstanz (Schottenstr. 37), Meßkirch kaj Litzelstetten (pastra domo), Volapük-vojo kaj -hotelo en

Litzelstetten kaj baldaŭ Volapük-placo en Oberlauda. Krom tio Volapük-monumento en Ummendorf.

4. Prälats-Schleyer-Jahrbuch (ĝis nun unu eldono) sin dediĉas al la vivo kaj verkaro de Schleyer. Liaj 23 taglibroj estos digitalizitaj de BŠB kaj tiel alireblaj por pliaj esploroj biografiaj.

5. La retejo de la paroko de Litzelstetten, kie Schleyer pastris de 1875 ĝis 1885, regule raportas: <http://www.bodanrueckgemeinden.de>

6. De la 100-jariĝo de Volapük (1980) ĝis nun aperis granda nombro da artikoloj divers-aŭtoraj (i. a. de la verkema Künzli mem), kiuj antaŭenigis la sciencan okupiĝon pri Volapük.

Lasta-tempe en grava biblioteko malkovriĝis arkiva materialo (korespondoj, protokoloj) kaj presaĵoj tie dormintaj en skatoloj dum preskaŭ 120 jaroj. Sed tio estos aparta ĉapitro...

Reinhard Hauptenthal



Schleyer kaj ties emocioj pri Esperanto

Kiel *Cifal* [Prezidento] de la nuntempa volapuka movado, mi sentas, ke estas justo komenti pri kelkaj detaloj en la artikolo de Andreas Künzli *Zamenhof kaj ties emocioj pri Volapük* en *La Ondo de Esperanto*, 2012, №7, p. 13-15. Antaŭe, tamen, mi asertu, ke nek mi nek la Sog Bevünetik Volapüka [Internacia Volapuka Asocio] nun intencas kontraŭdiri la superelstarecon de Esperanto, lingvo kaj movado. Taŭgas proksime al la jarcentdato de la morto de Johann Martin Schleyer konsideri lian vidpunkton rilate al Zamenhof kaj Esperanto. Mi uzas la PIV-an formon de la lingvo, kiel Zamenhof post fruaj jaroj.

“Zamenhof baldaŭ komprenis, ke Volapük pro sia troa artefariteco tute ne taŭgas kiel mondlingvo”. Tiu estas sendube la sincera opinio de Zamenhof, konsideranta siajn multajn laborojn kaj esperojn rilate al sia projekto, kaj la opinio de aliaj, kiuj ne spertas Volapukon. Kiam Zamenhof diris tion, ke tiom da individuoj (2.000), kluboj (128) kaj landaj federacioj (6) en tiom da gazetoj (28) kaj libroj (334)¹, dum eĉ tiom malmultaj jaroj flue uzis la lingvon, ŝajnas malfortigi tiun kredon.

Imagu vin en la ŝuoj de Schleyer, kiam ŝajne aroganta nekonato “montris sin diplomatia, adorea kaj afabla, tamen ne senkritika”. Vi ricevas leteron en nekomprenebla lingvo. Eble vi povas konjekti, ke tiu letero petas al vi forlasi vian plensukcesan, evidente dibenitan projekton. Ĉu vi ne konsiderus la skribanton rivalo?

«Zamenhof konfesis al Julius Riegel, “kreante mian lingvon mi ne sciis pri Volapük, ĉar ĝi tiam ankoraŭ ne ekzistis”». Ĉu la datoj ne neas tion? La unuaj eldonoj de tiuj lingvoj estis Volapuko 1879 kaj Esperanto 1887. Tamen ni povas nur dubi, ĉu Zamenhof sincere povis kredi siajn vortojn, spite la klubojn en Pollando mem (Wrocław 1882-1890 kaj Brzeg) kaj multajn proksimajn en Germanujo kaj aliloke en Eŭropo.

Schleyer kreis sian lingvon por la tuta mondo, ne nur la okcidenta. Do tute ne gravas, “ke lingvo tutmonda devas esti antaŭ ĉio *komprenebla*” specife ĉar ĝi baziĝas plejparte sur nur malmultaj eŭropaj lingvoj. Volapuko kreiĝis por la loĝantoj en ĉiuj kontinentoj; kaj fakte tie estis parolantoj kaj grupoj. Ne insultis Volapukon “kompari ĝin kun la lingvoj hotentota kaj turka”. Kiam oni al kutimiĝas paroli lingvon (eĉ Esperanton) oni ne konsideras la devenon de la vortoj kaj gramatiko. Tuja komprenebleco (el malmultaj lingvoj) estis pli kaj pli la celo de lingvoj, kiuj fendiĝis kaj de Volapuko kaj de Esperanto aŭ kiuj poste denove kreiĝis. Tamen, tiuj, kiuj volas esplori, agnoskos, ke Volapuko multon ŝuldas al eŭropaj lingvoj.

Zamenhof timis el Volapuko la “naskiĝado[n] de ĉiam novaj lingvoj tutmondaj”. Sed siatempe kaj simile kaj bedaŭrinde tiaj fendiĝadoj okazis ankaŭ ĉe Esperanto.

«Zamenhof opiniis, ke Volapük ne estas belsona kaj ke ĝiaj sonoj estas “sovaĝaj”». Tian plenan subjektivecon ĉiu homo sen vera kaŭzo povas senti por ĉi tiu aŭ tiu nekonata fremda lingvo, precipe kun malsimila fonetiko.

«Zamenhof rememorigis ankaŭ, ke “Volapük pereis ĉefe pro [...] *absoluta manko de natura evoluipovo*”». Ke estas tiom multegaj publikaĵoj, ke la hodiaŭa Internacia Volapuka Asocio havas retpaĝon, ke oni korespondas glate per Volapuko, ke la hodiaŭa gazeto *Vög Volapüka* enhavas multspecajn

artikolojn, montras ke la lingvo ĉiam kaj nature evoluas.

El la detala atesto de Andreas Künzli, oni vidas, ke Zamenhof vere admiris Schleyer-on kaj liajn klopodojn, ke li ne povis ne kredi sian lingvon pli taŭga, sed tamen, ke li sentis sin devigita mallaŭdi la lingvon rivalan. Tio estas neevitebla en la propagandado de iu ajn varo por gajni subtenantojn. Ĉu eble ankaŭ Zamenhof estis “ne libera de aroganteco” kaj eĉ kalumnioj?

Mi ne neu, “ke Schleyer mem estis libera de aroganteco”. Sed ĉu vere li povis emi “reciproki la afablecon kaj bonvolajn sentojn de Zamenhof, direktitajn al li” en rivala nekomprenebla lingvo? Ĉu li ankaŭ ne devis sin defendi, respondi kaj ataki troigante la siaopiniajn difektojn por konservi siajn subtenantojn kaj allogi novajn? Kiel en ĉiu disputo, oni atente kaj objektivite kontrolu, de kie la protagonistoj venas kaj kien ili emas iri.

Laŭ angla proverbo, ĉiu patrino konsideras siajn anserojn cignoj; “ĉiu vulpo sian voston laŭdas”² — kaj aliulajn mallaŭdas.

Brian Bishop

Notoj

1. Nombroj bazitaj sur la *Jenotem valemapika Volapük* de Johann Schmidt (1964) http://wikisource.org/wiki/Jenotem_valemapi%C3%BCka_%E2%80%9AVolap%C3%BCk_%E2%80%9B Vidu ankaŭ *Jenotem brefik Volapüka* de Johann Schmidt (1939): http://wikisource.org/wiki/Jenotem_brefik_Volap%C3%BCka

2. Zamenhof L. L. *Proverbaro esperanta*, 275.

Harry Harrison forpasis

La renoma verkisto Harry Harrison forpasis la 15an de aŭgusto 2012 en Crowborough (Anglio). Li naskiĝis la 12an de marto 1925 en Stamford (Konektikuto, Usono). Harrison lernis Esperanton en sia junaĝo kaj estis membro de UEA ekde 1945. En 1985 li estis elektita al la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Irlando kaj honora membro de la Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (nun Esperanto-USA).



Harrison famiĝis pro siaj sciencfikciaj romanoj, en kiuj ofte aperas mencioj pri Esperanto kiel lingvo de la estonta mondo kaj ankaŭ specimenaĵoj tekstoj en Esperanto. La plej fama parto de lia verkaro estas la serio pri la *Rustimuna Ŝtalrato*. Unu libro de la serio, *La naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato*, aperis en kolektiva Esperanta traduko en 1996 ĉe *Sezonoj* kaj estas nun senpage elŝutebla. Jam pli frue *Sezonoj* eldonis lian novelon *La stratoj de Aŝkelono* (1994, tradukis William Auld). La unua Esperanta traduko de verko de Harrison estis *La verda estonteco*, sciencfikcia novelo pri Irlando, kiu aperis ĉe Esperanto-Asocio de Irlando en 1984. En 2001 *Impeto* eldonis tradukon de lia romano *La kaptita universo*.

Ni funebras kaj kondolencas.

La Ondo

Kio okazas, kaj kion fari?

La ĉefa obstaklo por la disvastigo de Esperanto estas, ke post la dua mondmilito la angla-usona iom post iom akiris hegemonian pozicion pro la ekonomia potenco de Usono. Okazis nova tipo de koloniado, per la angla lingvo. Ne nur evoluantaj landoj, sed ankaŭ evoluintaj landoj lasis sin kolonii, ne vidante la malavantaĝojn kaj ne serĉante alternativojn. Kontraste al teknikaj novaĵoj, Esperanto spertas stultan kontraŭstaron pro cerbolavado. Homoj kredas, ke la angla estas la monda lingvo kaj havas nur netaŭgajn argumentojn kontraŭ Esperanto. Claude Piron tion bone priskribis en sia libro *Le défi des langues*. Post daŭraj malsukcesoj, kiam li volis propagandi pri Esperanto, li eĉ mensmalsaniĝis kaj devis serĉi helpon de psikiatro. Iom post iom li komprenis, ke ne li, sed ĉiuj aliaj malpravas kaj suferas je kolektiva psikozo.

Eble ne ĉiuj konas la antaŭdiron de LEAP. Laboratoire Européen d'Anticipation Politique estas sendependa organizo kun 6 konstantaj kaj 40 partatempaj sciencistoj. LEAP gajnis altan kredoblecon, kiam ĝi anoncis, antaŭ ĉiuj aliaj, la tropufiĝon kaj la krevon de la financa-domvenda veziko. Ĉiumonate 200 mil legantoj vizitas la retejon de LEAP. Do, LEAP antaŭvidas la finon de la angla-usona kiel hegemonia lingvo ĉirkaŭ la jaro 2025. Grava informo! Post dekkvino da jaroj Esperanto havas la ŝancon venki.

Sed tio ne okazos aŭtomate! Necesos multe da laboro. Grava ŝtupo estas enkonduki la instruadon de Esperanto en la lernejoj. EEU jam sukcesis enŝovi en la rekomendojn de iu Eŭropa laborgrupo, ke oni studu la plej taŭgajn ilojn por plifaciligi la lernadon de lingvoj (aludo al la propedeŭtikaj kvalitoj de Esperanto)...

Rilate la celgrupojn, ni bezonos helpon de politikistoj kaj decidantoj. La metro estis adoptita en Francio dum la revolucio. Oni ne faris voĉdonadon, en tiaj aferoj la registaro decidas la plej bonan sistemon por la bono de la popolo. Multaj aliaj landoj sekvis la ekzemplon, tiom evidentaj estis la avantaĝoj de la metra sistemo. Ne necesis konvinki iun ajn celgrupon. Kaj kiam Svedio adoptis la dekstran trafikon, tio estis kuraĝa decido en la intereso de la lando, malgraŭ la altaj kostoj.

Pri Esperanto ne tiom valoras la neŭtraleco kiom la propedeŭtikaj kvalitoj, ĉar la multlingveco estas politiko de EU. Sed decidantoj certe deziras almenaŭ minimuman popolan subtenon. Por atingi la unuan ŝtupon (permesi la instruadon de Esperanto en lernejoj) ni bezonas multe pli da esperantistoj kaj personoj interesitaj pri Esperanto. Mi opinias, ke ni devus celi la dekobligon de la esperantistoj — Lu eĉ skribis 25-obligi! Mi kaj mia edzino havas nur mallongan (malpli ol 7 jaran) sperton kun Esperanto. Sed ni jam varbis 9 personojn, t. e. 5,5-obligis la nombron. Kiel varbi? Ni ĉiam propagandas. Kiam ni vizitis Berlinon kun amikino el Liono, ni parolis Esperanton en la metroo. Okazis dufoje, ke iu demandis nin, kiun lingvon ni parolas, kaj ni klarigis.

Kiam mi prezentas Esperanton en taŭga ĉirkaŭaĵo kaj havas sufiĉe da tempo, mi substrekas la ekonomian aspekton: la uzo de Esperanto permesus al la impostpagantoj de EU ŝpari 25 miliardojn da eŭroj ĉiujare, kompare kun la nuna preskaŭ tut-angla situacio. Ni forgesu la revojn pri “sankta harmonio” ktp. Kaj se vi anoncas, ke vi uzas Esperanton por ŝanĝi la mondon, vi havos multajn malamikojn.

Pro la psikologio de multaj homoj, kiuj nenion scias pri Esperanto, sed kontraŭstaras pro cerbolavado, bona metodo estas ruzi. La eldonisto de KAVA-PECH, Petr Chrdle, rakontis

al mi la jenon: se li anoncas prelegon pri Esperanto, venas neniu. Se li anoncas prelegon pri vojaĝo en Japanio, venas dekoj da aŭskultantoj. Kiam li mencias en la prelego, ke dank’ al Esperanto li povis senpere paroli kun japanoj, li ricevas tiom da demandoj pri Esperanto, kiom pri Japanio.

Mi verkis libron *Cross-Country Skiing Around the World*, en kiun mi enŝovis ĉapitron *The International Language*. Tiu ĉapitro trovis sian lokon logike, post analizo de membrostatistiko de International Association of Worldloppet Skiers, kiun mi fondis en 2001 kaj prezidis dum 9 jaroj. El Britio aliĝis 18 membroj, el Aŭstralio 34 kaj el Usono 78. Certe oni povus supozi, ke el la veraj landoj de skiado (Norda Eŭropo) aliĝis centoj. Tute ne: el Norvegio 14, el Svedio 24 kaj el Finnlando 34. Tio okazis pro la fakto, ke la asocio uzas la anglan, kaj tio estas diskriminacia. La instruado de la angla fiaskis en landoj, kie ĝi ne estas la nacia lingvo. Tiu konstato permesis al mi enkonduki Esperanton en la libro. Centoj da legantoj informiĝis pri Esperanto.

La libro aperis en septembro 2011. Unu el la unuaj aĉetantoj estis viro en Amritsar (Hindio), kiu tuj petis de la eldonisto informojn pri taŭga metodo por lerni Esperanton. Kiam mi renkontis lin en 2012, li deklaris, ke Esperanto estus eleganta solvo de la lingva problemo en Hindio. Amuza koincido: li estas okulkuracisto, kiel Zamenhof.

Hannes Larsson

La plej popularaj artikoloj en nia retejo

La 12an de aŭgusto 2011 en nia [novajretejo](#) *La Balta Ondo* ekfunkciis vizit-kalkulilo. Unu jaron poste ĝi montris, ke dum la pasintaj 366 tagoj en nia retejo okazis 63 mil 772 paĝovizitoj.

Jen la listo de la plej legataj artikoloj.

1. Dennis Keefe. Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto (1)	2217
2. [Aleksander Korĵenkov]. Katastrofo ĉe <i>Vinilkosmo</i>	1027
3. Grigorij Arosev. Kio estas la reala trezoro de REU?.	854
4. Komitatano Z. Hundoj bojas, karavano vojnas	756
5. Giorgio Silfer. La Esperanta Civito progresas al nova etapo	755
6. Trevor Steele. Ĉu malesperi?.	753
7. Aleksander Korĵenkov. Kiom da esperantistoj en Ruslando?	734
8. Zbigniew Galor. Kvar vizioj: Kiel vivi en la ruiniĝanta Esperantio?	585
9. Vinko Markovo. Kamarado prezidanto respondas: Intervjuo	577
10. Aleksander Korĵenkov. Guglo: “Mi nur nun ĵus, kaj lernis mia granda surprizo”	555
11. José Antonio Vergara. Esperanto estas multe pli valora ol speco de malangla aŭ identecofonto de supozata “popolo”	537
12. Katalin Kováts. La unua kursaro sur la Esperanto-Insulo	532
13. Dennis Keefe. Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto (2).	526
14. Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Iom pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	523
15. Aleksander Korĵenkov. Nia libroproduktado en la 2011a jaro	450
16. Dennis Keefe: Mi fieras esti esperantisto	440
17. Mini/BMW gratulas Esperanton.	398
18. Komitatano Z. Lingvaj dorsosakuloj.	383
19. Dennis Keefe. La leciono de Vakero Marlboro kaj Esperanto.	383
20. Komitatano Z. Survoje al la Fettes-erao	373

Novaj-malnovaj eldonaĵoj de E@

Ne nur pri retaj projektoj okupiĝas la organizo Edukado@Interreto. Eĉ se ili estas la plej grava laborkampo, dum lastaj jaroj iĝis tre fruktodona ankaŭ ĝia eldona kampo. Danke al tio aperis pluraj gravaj, interesaj Esperanto-verkoj.

Tri eldonaĵoj aperis antaŭnelonge. Efektive ĉiuj tri estas reeldonoj — korektitaj, kun aldonaĵoj, pliriĉigitaj. La bezono de reeldono nur konfirmas iliajn gravecon kaj utilon. Ĉiu el ili malsamas, sed same ĉiuj estas tre gravaj en sia medio, efektive temas pri preskaŭ preskribaj verkoj por koncernaj fakoj/medioj:



Bertilo Wennergren. *Detala Gramatiko de Esperanto*. 220 paĝoj. 12 eŭroj.

Bertilo Wennergren, akademiano kaj verkinto de la fama PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) verkis alian gravan gramatikan libron: tiun ĉi. Ĝi baze estas malpli ampleksa versio de PMEG, sed ĝi uzas ĉefe la tradiciajn gramatikajn terminojn. La verko estis kreita origine por la bezonoj de la reta kursejo www.lernu.net. Tamen ĝia utilo povas iĝi pli granda, sekve ĝi nun aperas ankaŭ en libra formo, jam kiel dua, plibonigita eldono.

Yves Nevelsteen. *Komputeko*. 114 paĝoj. 6,60 eŭroj.

Komputeko estas mallongigo de prikomputila terminokolekto. En la dua eldono aperas 7.800 komputil-rilataj kapvortoj en la usonangla lingvo kun traduko al Esperanto. Kompare kun la unua eldono estas pli ol 500 aldonoj kaj modifoj.

Troviĝas en ĝi ankaŭ kelkpaĝa multlingva vortareto (usonangla, nederlanda, franca, ĉeĥa) kun kapvortoj en Esperanto kaj kelkaj paĝoj kun bildoj kaj klarigoj. Kompare kun la unua eldono la libro enhavas 24 novajn paĝojn, plurajn novajn ĉapitrojn, ktp.



Esperanto elektronike

En julio 2012 eldoniĝis jam la kvara eldono de la disko, en la kvanto 3000 ekzempleroj (entute jam aperis 21 mil pecoj). Ĝi lanĉiĝis dum SES 2012 en Nitra, kie la 26an de julio po unu ekzemplero estis donacita al ĉiu el la 250 partoprenantoj okaze de la 125a jubileo de Esperanto.

Por tiu ĉi eldono nun estas speciala prezo — nur 0,90 EUR/peco, ĉe mendo de 100 (aŭ pli da) ekzempleroj. La kovrilo estas 2-lingva, EO-EN (aŭ ekzistas ankaŭ FR-EO versio). La disko enhavas amason da nova materialo, kolektita ĉi-jare. Aperas surdiske ekzemple: 24 novaj E-kantoj; 14 novaj libroj; *Tatoeba*: ĝisdatigita al 160 mil frazoj (duoblo de la 3a eldono); *Forvo*: nova eksterreta versio (6000 registritaj vortoprononcoj); Wikimedia Commons: indekso de 1837 fotoj en kategorio Esperanto kun miniaturoj; Novaj jarkolektoj de: *Internacia Pedagogia Revuo* 2005-2010, *La Ondo de Esperanto* 2011, *Monato* 2011, *Esperanto* 2011, *Kontakto* 2011, *Informilo por Interlingvistoj* 2011.

La tri reeldonitaj verkoj haveblas en kutimaj libroservoj.

Se vi interesiĝas pri pli granda mendo-kvanto, bv. kontakti rekte E@I ĉe: info@ikso.net.

Peter Baláž

E@I-kunordiganto

ESF: Plividebligi Esperanton

ESF fondas plen-proprietan filion por mastrumi la daŭran disvolvado de projektoj kiel lernu.net, la bone konata multlingva retejo por lerni Esperanton.

En Montrealo (Kanado) dum sia jara strategia sesio la ESF-estraro nomumis Erin Piatieski kiel fondon ĝeneralan direktoron de la nova kompanio, kiu estos registrita en Vaŝingtono (Usono) sub la nomo ESF-enrete.

“Nia celo estas igi la diversajn retroprojektojn finance memstaraj, kaj samtempe certigi ke tiuj projektoj ne ekdominos la tutan prioritataron de la Fondaĵo”, — diris ESF-prezidanto Mark Fettes. — “La evoluo de *Lernu* ege kuraĝigas nin, kaj ni daŭre konstruos sur ĝia sukceso. Dum la pasintaj kelkaj jaroj Erin grave rolas en la strategia planado de niaj retroprojektoj, kaj ni ĝojas bonvenigi ŝin en ĉi tiun novan rolon”.

Mekanika inĝeniero diplomita de MIT (Masaĉuseca Instituto de Teknologio en Kembriĝo, Masaĉuseco, Usono), Piatieski estas aktive engaĝita kun *Lernu* jam de antaŭ ties lanĉo en 2002. Kiel ĝenerala direktoro ŝi proksime kunlaboros kun aliaj membroj de la kerna mastruma teamo de la retejo. Ŝiaj prioritatoj inkluzivas strategian planadon, kreadon de partnerecoj kun individuoj kaj organizoj, kaj mastrumadon de la centoj da volontuloj de la retejo.



“*Lernu* jam estas la plej granda enreta komunumo de Esperanto-parolantoj kaj Esperanto-lernantoj”, — rimarkis Piatieski. — “ESF ludis esencan rolon en la disvolvado de la retejo, kaj ni antaŭĝuas ampleksigi ĉi tiun rilaton per ESF-enrete. Laŭ ni, la projekto estas en unika pozicio stimuli kunlaboron inter Esperanto-parolantoj tutmonde kaj plividebligi Esperanton ĉe la ĝenerala publiko”.

Unu plena tago de la Montreala kunveno estis dediĉita al planoj por modernigi kaj ampleksigi *Lernu* per novaj kursoj, forumoj, kaj ampleksa biblioteko, ĉiuj integritaj en plibonigitan teknikan fundamenton. Lanĉo de la nova retejo estas planata por proksimume koincidi kun la deka datreveno de *Lernu* fine de 2012 aŭ komence de 2013.

Ĉu vi lernis Esperanton per *Lernu*? Ĉu vi konas iun kiu lernis Esperanton dank’ al *Lernu*? Ĉu vi subtenas la ideon de ampleksa, moderna, efika Esperanto-lerna retejo alirebla ĉie tra la mondo? Se vi respondis “jes” al iu el tiuj demandoj, bonvolu montri vian subtenon per donaco al la kampanjo “100.000 eŭroj por ESF”:

<http://kampanjo.ikso.net/eo/>

ESF

Savi la vivon (8)

Donacoj ricevitaj ekde 18 mar 2012 ĝis 15 aŭg 2012

Ĵak Le Puil (Francio)	28,00
E-rondo Neŭbrandenburgio (Germanio)	71,00
Keneĉjo Goldbergo (Usono) 10 USD	8,14
Entute ekde 18 mar 2012 ĝis 15 aŭg 2012	107,14
Je la 17a de marto 2012	30.927,00
Je la 15a de aŭgusto 2012	31.034,14

Ĉiuj sumoj en la dekstra kolumno estas en eŭroj.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Antaŭ ducent jaroj



La frenezeco de la milito sin montras en ĉiu milito. Eble, la frenezeco de la rusa kampanjo de 1812 portis en si iun enorman spektron de absurdismo.

La plano de Napoleono havis, certe, sian logikon. Dorlotita de sukcesoj despoto, li deziris domini la mondon. Konkeri Ruslandon, poste iri kune kontraŭ Hindion: dolĉa perspektivo sin bani en la suda oceano, dolĉa gloro de la posedanto del universo. La pli konkreta plano same ne estis sensenca. La imperiestro ne intencis pasi tro profunden. Venki la rusan armeon ĉe la limo, restitui Pollandon en ĝia historia dimensio, fini per la paco, kiu igus la caron lia satelito. Oni atendis atakon de la rusa armeo. Tamen la prudentaj Ruslandaj stabestroj ne rapidis aktivigi la situon. La aŭdaca ofensiva propono de Bagration ne iĝis bazo de ilia strategio.

— Mi disbatos la rusojn antaŭ Smolensko! — deklaris Bonaparto.

— La francoj batalu kontraŭ niaj vastaĵoj! — replikis Aleksandro.

La batalo kontraŭ la vastaĵoj ŝajnas la plej stranga el bataloj. La imperiestro ne povis plu atendi. La somero restis la tempa dimensio de liaj iniciatoj. Poste lin estis kontraŭstaranta severa aliancano de la rusoj — generalo Frosto.

La milito kontraŭ nevidebla malamiko en arbar- kaj marĉplenaj spacoj, kiam la linio de la provizado iĝas ĉiam pli longa kaj maldika kaj la provianto — ĉiam pli ekzotika kaj maltrovebla. Julie la triono de la franca armeo estis banale, sed fatale neŭtralgita de la disenterio. Neniu sturma potenco kompareblis kun tiu silenta armilo de morto. Tiutempe la rusaj trupoj retiriĝis orienten, lasante post si detruitajn vojojn, bruligitajn vilaĝojn kaj malplenajn urbojn.

Frenezaĵo: antaŭ la kampanjo oni serioze diskutis la projekton ribeligi la rusajn kamparanojn, pere de aerostatoj, de kiuj oni disĵetu kontraŭfeŭdajn agitfoliojn.

Pasis la trupoj, en vana sopiro pri decida batalo. Pasis la sovaĝa orienta somero, degelis de drasta ventra malsano la ega (komence duonmiliono) armeo.

En la proksimo de Smolensko la imperiestro ekhezitis, li sentis la densiĝon de absurdo. Se la caro venus interparoli, se la rusaj strategoj komandus la grandan batalon. Tiam, kiel ĉiam antaŭe, mortus centmiloj kaj fariĝus triumfo de milita genio.

La strategoj gardis sian prudentan principon, ili cedis la teron kaj ŝparis la homojn. Ĉiam pli absurda, la logiko sugestis al la imperiestro iri plu.

Ĉu Borodino estis necesa defenda rimedo? Evidente, ne. Ĝi estis la cedo de tiuj, kiuj forlasis sian teron kaj formetis sian ideon de kavalira rivaleco. 50–60 miloj da mortoj iĝis la pago pro la kavalireco. Masakro en kiu forpasis la plej kuraĝaj soldatoj de ambaŭ partoj de Eŭropo. Absurdo de la ludo je la monda politiko, kie la ekspeono certigas la universon ke ĝi ja iĝis reĝo.

La granda kaj bravega batalo finiĝis per nenio: la francoj ne disbatis la rusojn, la rusoj de haltigis la francojn. La invada armeo eniris la incendian Moskvon kaj stagnis en angoro. Ĝin ĉirkaŭis fremda dezerto. Al ĝi proksimiĝis la severa malamiko generalo Frosto.

Imagu la eventojn sen troa detaligo. Pli ol kvincent miloj da homoj penetras la teritorion je pli ol 1000 kilometroj, mortas pro malsanoj, mortigas kaj estas mortigataj, poste haltas kaj retroiras: mortas pro malvarmo, mortigas kaj estas mortigataj, fine — pereas preskaŭ ĉiuj.

Pro kio? Por kiu?

La fiera centra heroo de ĉi tiu historio restis vivi kaj plu drivi en la akvoj de la granda Eŭropa politiko. Centmiloj da ceteraj herooj ne trafis la historian fokuson kaj dronis en rivero de forgeso. Vere, ili meritis pli bonan sorton. Mi pensas, ke digna tasko por diligentaj historiistoj estus revenigi ilin al la memoro del homaro.

Alen Kris

En la paĝosupro estas uzita la pentraĵo “La Batalo ĉe Borodino, la 7an de septembro 1812” de Louis Lejeune (1822).

Fatraso, Kanibalo kaj Damaĝantoj

La 34a Moskva Internacia Kinofestivalo

La 34a Moskva Internacia Kinofestivalo (MIKF) el la oficiala vidpunkto fariĝis triumfa por la britia kino. Estis du konkursoj por ludfilmoj (la ĉefa kaj *Perspektivoj*), kaj en ambaŭ venkis reprezentantoj de Britio: respektive *Junkhearts* (la tradukon de ĉi vorto ni traktu aparte en sekva alineo) kaj *The Wreckers* (La damaĝantoj). Krome la ĉefrolulo en *Junkhearts* Eddie Marsan ricevis premion por la plej bona vira rolo, kaj en la konkurso de dokumentaj filmoj venkis *Searching for Sugarman* (Serĉante Sugarman-on), kie Britio estis unu el kunproduktantoj.

La menciitaj rezultoj de la ĉefa konkurso estas des pli mirindaj, ĉar du aliajn tieajn premiojn — por la plej bonaj reĝisoro (Andrej Proŝkin) kaj virina rolo (Roza Ĥajrullina) prenis la rusia filmo *Orda* (La hordo). Estis tre nekutima decidmaniero de la ĵurio, ĉi-foje prezidata de la brazila klasikulo Héctor Babenco, ne ĉar *Junkhearts* kaj *La hordo* ne meritas la premiojn, sed ĉar nun ŝajnas, ke la aliaj konkurintoj estas ne tre altnivelaj. Tradicie ĉiujn kvar premiojn de la ĉefa konkurso ricevas malsamaj filmoj, do entute kvar. Ĉi-foje estis duoble malpli, kvankam estis kroma premio “Speciala mencio”.

Do, la plej bona filmo fariĝis *Junkhearts*. Unue, ni provu traduki la titolon. Ruslingve la filmo nomiĝas *Otbrosy* (Fatraso, forĵetaĵo), kio fakte estas “junk” en la angla. Sed ial en la rusa traduko estis neglektita la vorto “hearts” (koroj). Probable tio okazis ĉar ne estas facile diri bele en la rusa *Fatrasaj koroj*. Ni do uzu ĉi tiun varianton, kvankam tiu en la rusa ankaŭ estas trafa, ĉar la vorto “otbrosy” krom la forĵetendaj objektoj signifas ankaŭ homojn, “la sociajn restaĵojn”. Ĝuste pri tiuj temas en *Fatrasaj koroj*. Frank, eksoldato, estas turmentata de la pasinteco, kiam li faris fatalan kaj nekorekteblan eraron — dum militservado li neintence mortigis virinon kaj etan infanon. Por regajni iom da viva energio li proponas al senhejma junulino Linnet ekloĝi en sia hejmo. Iuj postaj eventoj estaj prognozeblaj, iuj ne, sed ĝenerale *Fatrasaj koroj* lasas fortegan impreson, kaj Eddie Marsan (Frank) tute prave estis honorita de la ĵurio.

La hordo rakontas pri la 14a jarcento kaj la potenco de La

Ora Hordo, tiutempe reganta en la plejparto de Eŭroazio. La baza temo estas neatendita blindiĝo de la ĥanino Tajdula. La moskva metropolito kaj miraklofaranto Aleksio estas vokita por kuraci ŝin, kaj de tio dependas la sorto de la tuta Moskva princlando. Tre bona filmo, rekonstruanta la spiriton de la oriento, tiamaj intrigoj kaj mezepoka krueleco.

La “Specialan mencion” ricevis la meksika filmo *Fecha de caducidad* (Validofino) — historio de la morto de viro, kiu (la historio) estas montrata de tri vidpunktoj — lia patrino, ŝia najbarino kaj alia viro, kiu estas suspektata je la mortigo. La kinaĵo ne estas tre elstara, tamen estas tre ĝojiga, ke la konkurson partoprenis filmo el Meksiko, des pli — reĝisorita de tre talenta virino (Kenya Marquez).

Krome memorfiksiĝis la italia *A.C.A.B. (All Cops Are Bastard — Ĉiuj policistoj estas bastardoj)*, rakontanta pri ĉiutaga vivo kaj laboro de policista draŝbrigado, batalanta kontraŭ futbalaj miszelotoj, eksterleĝaj enmigrintoj kaj aliaj. Bonega flanko de la filmo estas, ke neniu estas montrita plene prava kaj plene malprava. La vero estas ie meze, sed plurajn problemojn kaŭzas ŝtato, kiu foje devigas konduki foje tute absurde.

La pollanda *80 milionoj* kaj la hungaria *As ajto* (La pordo) tradicie por MIKF prezentis temojn el la socialisma pasinteco de la landoj. La finna *Vuosaari* kaj la estonia *Üksik saar* (Soleca insulo) ambaŭ estas miksaĵoj de historioj pri sufiĉe akraj problemoj de la nunaj homoj.

Multe preparolata iĝis la kroata *Ljudožder vegetarijanac* (Kanibalo-vegetarano). La filmo levas ne tre novan temon de malleĝaj abortigoj, kaj *Kanibalo* ne ricevas sian porcion da atento, se ne estus detale filmita sceno de abortigo — spektantoj vidas, kion la doktoro faras kaj kio poste kuŝas en la kirurgia telero — aspektas ege impresaj kaj ŝokige. Sed ĉu bezonate?

Kiel dirite, la konkurson *Perspektivoj* gajnis *La damaĝantoj* — historio de geedzoj, subite malkovrantaj mensogon, kiu preskaŭ ruinigas iliajn rilatojn. La filmo apenaŭ estas la plej forta inter ĉiuj montritaj, sed sendube la ĵurion impresis la nun treege fama aktoro Benedict Cumberbatch, ĉefrolanta en *La damaĝantoj*. Do tia aljuĝo de la ĉefpremio estis iusence simbola gesto.

Eksterkonkurse furoregis la usona *Moonrise kingdom* (La plenluna reĝlando), kortuŝa kaj samtempe amuzega historio de du adoleskantoj, kiujn gardas adoltoj, kaj (denove!) britia *The angels' share* (La anĝela parto), ironia komedio pri kvar skotaj duonkrimaj malsukcesuloj, kiuj strebas iel ŝanĝi siajn vivojn.

Grigorij Arosev



William Auld

Nenies nomo tiom sinonimiĝis kun la Esperanta poezio kiom tiu de William Auld (1924–2006). Senriske de tro-laŭdo, eblas diri ke Auld difinis la ĝenron de la postkaloĉaja erao, kaj ke nia poezio restas en lia ombro ĝis hodiaŭ.

Debutante sur la verda scenejo en 1952 kiel membro de la t. n. skota skolo, Auld kaj liaj kamaradoj Dinwoodie, Rossetti kaj Francis ekredifinis la poezion per sia kunpublikigita poemaro *Kvaropo*. Sed en *Spiro de l' pasio*, la Aulda volumero, la stilo ne tro devias de la parnasisma rimemo, malkiel postaj liberversaj kaj nerimaj eksperimentoj, komence en lia ĉefverko *La infana raso* (1956). Ĉi tio akordas kun la retrospektiva disepokigo de la Esperanta poezio fare de Auld en lia postparolo de la *Esperanta Antologio* (1982), en kiu li difinas la Postparnasisman, kies pinta figuro li sendube estas, kiel etendanta de 1956 ĝis 1982. Neniom celante maltro aprezi la genion kaj novemon de posteuloj, mi pretendas, ke la Postparnasismo daŭras plu hodiaŭ, jam 30 jarojn poste.

Naskiĝinte en 1924, Auld konatiĝis kun Esperanto kiel 13-jaraĝa skolto. Esperantumado poste karakterizis grandan parton de lia vivo, kiel atestas la titolo de la rimleteraro *El Unu Verda Vivo* (1978). Liaj poemletoj al diversaj gravaj figuroj de la tiuepoka movado ne estas nur poezie kaj persone interesaj, sed ankaŭ povus esti historiografie gravaj per sia bildigo de la tiama Esperantuja etoso. Auld estis longdaŭra amiko ne nur de sia eldonisto Juan Régulo Pérez, sed ankaŭ fame de Marjorie Boulton, de kies kunkorespondado naskiĝis la ĉarma volumo *Rimletoj* (1976), kiu donas al la leganto senton de intima okulumo en la privatan mondon de du literaturaj gigantoj, kiuj sprite babilis kaj pri ĉiutagaĵoj kaj pri pli altaj humanismaj kaj artaj temoj.

En sia eseo *La poeto William Auld*, Edwin de Kock demandas kiomgrade Auld vere distingeblas de la parnasanoj, kaj Auld mem agnoskas grandan ŝuldon al siaj antaŭvenintoj, ekzemple en poemomaĝe al Kalocsay:

*Li estas nia mentor' kaj patro kara; —
sed pli, li donis al ni la pretan liron*

Sed se Parnasismo “streĉis la kordojn” de la Esperanta liro, Auld ekbardis per tiu liro je nova filozofia nivelo,



rime kaj nerime, por ilustru profunde homaman, akre kritikan sed forte optimisman konceptaron rilate ne nur la Esperantan aferon sed, pli vaste, la tutan homaron. Por Auld, la homaro samtempe etas kaj gigantas-etas je kosma-tempa skalo, kiel malmultvorte sed majstre ilustrite en la deka kanto de *La infana raso* (terformiĝo / [granda blanka spaco] / vivapero / [granda blanka spaco] / Sargono / Aleksandro / Zamenhof); la homaro stumblas kiel infano kun militoj, diskriminacio, kaj ĉiaspecaj barbarajoj, kaj mem apartenas al nur tre malvasta kosmero.

Sed samtempe, Auld vidas en ĝi profundan potencialon por maturiĝo, saĝiĝo, grandioziĝo. Ĉi tiun neparadokson li esprimas, ekzemple, per arte samversaj antinomioj en la unua kanto: la sinsekvaj generacioj estas *maldika, forta, obstina, fragila vivfadeno*. Ĉi tiaj taksado de la aktualo kaj optimismo rilate la futuron akordas kun la profunda esperantisteco de la poeto, kaj — iom aliforme, sed klare elfonte de — la interna ideo de la tradicia esperantismo. Humanismo certe ne originas en Esperantujo, sed nia lingvujo flegas ĝin tiom, ke estas neniu surprizo ke Auld fariĝis nia laŭreato, ke tia homaranisma voĉo leviĝis el nia kulturo.

Sed uzo de la vorto homaranismo eble maltaŭgas konsiderante la fortan sekularismon de Auld, kiun li substrekadis ekde sia poeta debuto. Auld ikonoklaste malakceptas ĉiun aŭtoritatecon sen radiko en la racio, kaj anatemas ĉiujn formojn de religio, vidante turniĝon for de supernaturaj fortoj kaj direkte al estonteco difinita de la homoj mem kiel parto de la antaŭe menciita homara maturiĝo. En la dektria kanto de *La*

infana raso, ekzemple, li klare kaj rekte esprimas ĉi senton:

*Dio estas grandioza,
tial ĝi ne degnas rilati persone
kun atomoj nomataj homoj.
Evoluigi nian genion kaj nian amon:
jen la sola vera religio.
Nia espero:
feliĉo de niaj posteuloj.
Nia fido:
perfektigeblo de la homoj.*

Dum religia pensmaniero atomskaligas homojn, Auld esperas plibonigi kaj plialtigi la staton de la homaro sur la tero, materiisme sed ankaŭ intelekto, komplete, kaj racie. La jena elĉerpaĵo el *Al Homo sapiens* resubstrekas la saman sintenon.

Homaro!

*Vi estas mia ununura dio.
Kernas en vi la sola savespero
por mondo ĵusnaskita per konscio
de l' bebe po-ioma homa klero.
Ĝis venis vi, la mondo ne ekzistis,
krom kiel pensofeto en utero*

*de l' vivimpulso, ĉar al ĝi rezistis
raciomank' kaj bruta memsufiĉo.
La Potencul' vi estas, estos, estis,
kaj ĉio kroma estas superstiĉo.*

Kvankam li plej elstaras kiel poeto, Auld verkis ankaŭ plurajn prozaĵojn, eseojn, kaj lernolibrojn.

Li ankaŭ vaste kaj impone tradukis el la angla kaj skota, ekzemple de Ŝekspiro, Byron, Fitzgerald, Wilde, Tolkien, kaj Burns. El tiuj tradukoj de mi legitaj, nome iuj de Ŝekspiro kaj Tolkien, mi kiel anglalingvano povas certigi ke la esperantigoj de Auld majstre transdonas la senton kaj sencon de la originalaj, kaj ke ili ŝajnas preskaŭ egale flujaj kaj senpene verkitaj.

Mi mem konatiĝis kun la poezio de Auld nur tuj post lia morto en 2006, kiam li 81-jaraĝe forpasis en Dolaro. Kiel freŝdata lerninto de Esperanto, mi tuj avide kaj mirigite legis *La infana raso*. Meditante pri la forpaso de la verkinto, mi sentis min dum la legado kiel ero de “ĉen’ senintermita” de Auld-aprezantoj, kiu certe daŭros longe post niaj mortoj, tiom longe kiom restas esperantistoj.

Anglalingva nekrologo en *Scotsman*, en kio ŝajnas al mi trafa priskribo, tekstis: “inter la postmilita generacio de Esperantaj verkistoj, neniu pli lertis je vekado de la dormanta beleco de la lingvo ol William Auld”.

Nick Kalivoda

Mozaiko kaj nevidebla lumo

Tomić, Senka. *Lampiro en mozaiko* = *Svitac u mozaiku*: [Poemaro] / Postparolo de Zlatoje Martinov. — Beograd: Interpress, 2011. — 96 p., il. — 200 ekz. — (Biblioteka Esperanto, №3).

La libro de Senka Tomić *Lampiro en mozaiko* enhavas kvardekon da “modernstilaj, liberformaj poemoj en la serba kaj en Esperanto”. Jam kelkfoje mi recenzis dulingvajn poemarojn, kie Esperanton paralelas slava lingvo, eĉ se ne libere regata de mi. Ĉiam estas interese kompari. Ĉi-foje ne temas pri traduko, nur ĉe unu peco estas menciita tradukinto, evidente la aŭtorino verkis en du lingvoj samtempe.

En ĉiu libro mi dekomence legas prezenton, antaŭ- aŭ postparolon por imagi, kio min atendas. Do ankaŭ nun. Sur p. 89 Zlatoje Martinov skribas (mi citas laŭlitere):

«... ŝian enprofundiĝon en la lingvon tra tempaj tavoloj, ne estas hazarda afero, sed kontraŭe tio estas ago kiu revenigas al la vortoj ilian trezoron kiu estas perdita tra la ĉiutagaj nepoetaj utiligoj de la lingvo. Ĉi tiu poeta “purigo” de la lingvo estas ankoraŭ unu poeta provo en la impresa vico de l’ similaj, ke al si mem kaj al aliaj oni montru pravigon de la propra poezio. Neniu poeto donas al sia leganto pretaj solvoj kaj ne donas finfinajn respondojn por starigitaj demandoj. La tasko de ĉiu poeto estas nur starigi demandojn kaj gvidi la leganton tra galerio de sia majstreco».

Plurfoje mi legis ion similan en aliaj poemplibro, ofte eĉ sen gramatikaj eraroj. Ĉiakaze, dankon pro la averto...

Nu jes, “moderna” poezio. Libera de ĉio — de rimoj, ritmo, interpunkcio, sencaj ligoj inter la vortoj kaj eĉ de la senco ĝenerale. Konforme al la modo. Kvankam tiu modo jam sufiĉe malnovas. Jam pasintjarcente mi skribis:

«Bona poezio trovas resonancon en homa animo, oni ĉiam denove revenas al ŝatata poemo, ripetas ĝin en diversaj cirkonstancoj, serĉante konsilon aŭ konsolon. Oni parkerigas la poemon en junaĝo kaj povas reciti ĝin post jardekoj — certe, se ĝi indas. Ritmo kaj rimoj estas la plej efika memorfiksilo, kaj se publiko aprezis la poemon — tiu povos vivi jarcentojn. Tamen, ĉu iu kapablas precize reciti ion el nunaj “avangardaj” poeziaĵoj, lozaj kaj plumpaj, almenaŭ duonjaron post tralego? Certe ekzistas trafaj



metaforoj, freŝaj vortkombinoj k. s., tamen kial rifuzi la plej potenca armilon, fidele servantan dum jarcentoj?» (*Cerbe kaj Kore*, 1998, №1, p. 5–6)

Ni vidu la promesitajn demandojn kaj iru tra la galerio de ŝia majstreco. Jen:

*per vidspaco mi etendas
seman akvon
verso falas sur mian okulon
mi ekpalpebrumas en dolor'
kaj vokas, vokas
Infanecon
(Infaneco, p. 11)*

Jen plu:

*Man-ondoj en pezo de lumo
Forrajdis ien ĝis tagiĝo
tra longaj padoj de lunperiodoj
per rideto de si (ĝis) la luno
(Mi meznokto, p. 13)*

Bele, ĉu? Tamen, ĉu vi ion komprenis? Preskaŭ ĉiun pecon eblas citi, ĉie estas la sama, hmm, aŭtora stilo. La paralelaj tekstoj, miakomprenne, identas — ja ne estas problemo traduki, se ne necesas konservi ritmon kaj rimojn; ne klaras, kiu lingversio aperis pli frue, kaj eĉ ne gravas. Fojfoje iu vorto ial staras enkrampe — kaŝita senco en tio ne kaptblas.

Jen plia fragmento:

*Mia rideto rekonas
la vian
post longa serĉado
en ombro
de elbruligita subkonscio
en memama boneco
kiu rekonas*

*nur sin
tra si-mem
(La rideto, p. 47)*

Unu negrandan poemeton mi citu plene:

Lumigilo

*Mi forvadis
je vortoj
nun tranoktas
je vejnoj plensangaj
kaŝita en ombroj
de la nokto
Sed
tiu mallumo
tiu trafluado
en tiu belega
postrestado
ĉu ne,
tio estas mi
tio estas ekzistado*

Eble sufiĉas. Decidu mem, ĉu kaj kiel la aŭtorino respondis la demandojn pri senco kaj motivo de propra verkado, menciitajn en la postparolo; ĉu vere *post la ekkono de ŝia poezio, ŝajnas ke ni estas pli eblecricaj por ilin respondi*. Aŭ eble vi, traleginte ĉion ĉi, decidis, ke ankaŭ vi mem povas verki sammaniere. Tiakaze konsideru mian konsilon, esprimitan antaŭ multaj jaroj:

«Kaj fine mi riskus proponi tre efikan manieron por verki modernajn poeziaĵojn: preni ajnan mezaĝan, laŭeble kleran viron, ebrigi lin ĝis tia stato, ke li ankoraŭ povu paroli, sed ne plu klare pensu; paroligi, registri lian paroladon kaj surpaperigi ĝin, kun ne pli ol po tri vortoj en ĉiu linio. Tiamaniere vi havos ŝancon iĝi moda kaj ŝatata poeto — se vi, certe, al neniu malkaŝos la sekreton de via krea metodo...» (*La Ondo de Esperanto*, 1998. №7, p. 15–16)

Valentin Melnikov





Aleksandro Mitin

Amiki kun aliurbanaj

Amiki kun aliurbanaj
Estas malfacile...
Memori premojn de la manoj,
Plendi malhumile,
Ke nun soleco estas sorto.
Nur post preskaŭ jaro
Aŭdiĝos la saluta vorto
Por la ne-najbaro.
Ne vidi unu la alian,
Revi pri revido.
Kaj amikecon incendian,
Ardan, sen perfido,
En koro gardi. Ĉiam timi —
Povas malaperi
Post tempo ĝi... Kaj trapilgrimi
Songojn. Kaj esperi...

Brakumi dum renkonto nova
En duonebrijo.
Kaj resti tiel ĉi — senmova.
Kaj atendu ĉio!
Atendu nun kutim' senforma,
Splena kaj postiča!
Kaj poste sekvos nokt' sendorma,
Estos temp' feliča.
Vi kiel fartas, kion faras
Dum interrenkonto?
Amikoj vortojn ne avaras,
Fluas la rakonto.
Rapide pasos la semajno,
En plej kara rondo...
Kaj ploro... Ploro ĉe la trajno
Al soleca mondo.

Ju malpli oftas la vizitoj,
Des pli oni ĝuas.
Amikoj tiaj iĝas mitoj,
Kiujn vi konstruas.
Se proksimiĝos la adresoj,
Iĝos vi najbaroj,
Sed tre diversaj interesoj.
Ne similos faroj,
Ĉu tiam ofte vi renkontos?
Diru ja — por kio?
Feliĉo tra kutim' ne fontos,
Svenos la pasio
Kaj ard'. Vi kun malsamaj planoj
Vivos malsimile.
Amiki kun aliurbanaj
Estas **tre facile!!!**

Esperantisto kaj poeto – danke al interreto

Aleksandro Mitin, 27-jara diplomita kemiisto el Niĵnij Novgorod, fariĝis la unua ruslandano, kiu prenis la unuan lokon en la poezia branĉo de la Belartaj konkursoj de UEA. Li, pli frua laŭreato de *Liro*, afable konsentis rakonti pri si al niaj legantoj.

Bonvolu rakonti pri via esperantistiĝo.

Mi esperantiĝis en 2008, kaj ĝis nun mi ne povas kompreni, kial tio okazis. Pri Esperanto mi aŭdis kaj legis antaŭe. Sed nur tiam mi subite-hazarde decidis rigardi, kiel do funkcias tiu nekutima lingvo. Mi eĉ la daton memoras — la lasta dekada de aprilo. Mi ekvidis Esperantajn skribaĵojn en la blogo de konato, do intereso aperis. Tio iam okazas al mi: aperas subita deziro pri io ekscii, legi, rigardi k. t. p.

Komence mi vizitis la paĝaron *Lernu!* Kelkajn tagojn poste mi trovis en librovendejo la libreton de Nikolao Gudskov kun Esperanta gramatiko. Kurson mi ne vizitis. Bedaŭrinde, en Niĵnij Novgorod, eĉ se restas esperantistoj, preskaŭ forestas movado, do mi iĝis esperantisto nur dank' al interreto.

Kiam vi komencis verki versaĵojn en Esperanto?

Mi lernis novajn vortojn per tradukado! Ankaŭ per la poezia. Kiam mi estis komencanto, mi simple “faris provon” traduki kantojn por trejnado. Komence estis laŭvorta traduko. Poste en interreto mi trovis rimvortaron kaj per tiu helpilo provis fari jam artajn tradukojn. Certe, la unuaj provoj estis teruraj. Sed dum plibonigado de miaj lingvoposedoj, mi revenadis al tekstoj kaj retradukadis ilin, ĝis mi vidis, ke estas jam sufiĉe bone. Kaj, provante trovi rimon per vortaro, mi fojon kaj fojon plu vidis la samajn vortojn kun traduko, do ili loĝiĝis en mia memoro.

Komence mi nur tradukis. Kaj krede, ke mi mem ne havas tiom da propraj ideoj por diri ion gravan. Aŭ simple “ion”. Kaj guto de vero en tiuj pensoj prezentiĝis: iam mi dum unu-du monatoj versas multe kaj iam — preskaŭ nenion. Mian unuan versaĵon *Sebastopolo* mi verkis en aŭtuno 2009, kaj en 2011 mi ŝanĝis kelkajn liniojn antaŭ publikigi ĝin.

Ĉu vi verkas ankaŭ ruslingve?

Ruse mi preskaŭ ne verkas. Mi ne havas problemojn kun ritmo, sed la plej malfacila estas serĉo de rimoj. Oni senprobleme povas dum kelkaj sekundoj rememori sufiĉe da rimoj, sed post tagoj

subite kompreni, ke forgesiĝis la plej taŭga vorto. Kiu estas uzata ĉiutage, sed la poeto ne pensis pri ĝi kiel pri rimo. Ankaŭ necesas memori, ke multe da ĝustaj rimoj en la rusa lingvo jam iĝis tro banalaj, do evitindaj aŭ eĉ evitendaj. En Esperanto dume estas alia situacio kaj aliaj tradicioj. Estas strange, sed verŝajne Esperante povas esti pli facile ol ruse.

Ĉu vi sciis, ke ĝis la jaro 2012 neniu rusia esperantisto fariĝis laŭreato de la Belartaj Konkursoj (kvankam soveticia foje jes)? Nur antaŭ kelkaj jaroj Helena Melnikova prenis la trian lokon... Kion ĉi tiu fakto signifas por vi?

Certe, estas agrable por mi esti venkinto. Mi sciis pri Eŭgeno Belonenko, ĉar mi tralegis la nomojn, premiitajn en la poezia branĉo. Bedaŭrinde, estas malfacile trovi tiun tekston de li. Estas surprizo, ke mi estas la unua laŭreato, ni rusianoj ja havas multajn poetojn. Iuj, versaĵne, eĉ ne partoprenas.

Ĉu vi verkas konscie pri iu certa temo, aŭ vin vizitas inspiro, kaj vi ne scias, pri kio temos en verkota poemo?

Mia poemo-gajninto diras ĝuste pri inspiro! Kiel kaj kiam ĝi venas. Sed inspiro nur montras la ideon por mi, kaj poste komenciĝas pripensado. Ofte la ideo povas esti ŝanĝita, iam — ne. Kaj iam novan nuancon por la poemo al mi donas hazarde trovita rimo. Ekzemple, la ideo de *Feliĉulo*, kiu gajnis *Liron*, estas komence iom alia. Sed kiam mi la ideon klarigas por mi mem, ĝi ŝanĝiĝis.

Vi fariĝis laŭreato de *Liro* kaj de la Belartaj. Laŭ via opinio, kial vi estas premiata? Kio faras viajn poemojn plej bonaj, kompare kun ĉiuj ceteraj?

Mi ne atendis, ke la ĉefan premion ricevos ĝuste *Inspiro*. Mi sendis tri poemojn, kaj pensis, ke, se mi gajnos ion, do tio estos *Amiki kun aliurbanaj* (kiu nenion ricevis). Aŭ *Rivero Honto* (Honora mencio). Kial venkis *Inspiro*? Verŝajne, la priskribita situacio estas konata por ĉiu, kiu versas. *Vivhorloĝo* (honora mencio de lasta jaro) havis, krom temo, ankaŭ onomatopeon. *Feliĉulo* en *Liro*? Eble pro la temo.

Intervjuis Grigorij Arosev

La Belartaj Konkursoj de UEA en 2012

En Hanojo, kadre de la speciala kunveno en la 97a Universala Kongreso de Esperanto, estis anoncintaj la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2012.

POEZIO

1a premio: **Aleksandro Mitin** (Ruslando) pro *Inspiro*;

2a premio: ne aljuĝita;

3a premio: **Timothy Brian Carr** (Britio) pro *La arto de la Poezio kaj Luiza*

Carol (Israelo) pro *Kandanco*;

Honora mencio: **Aleksandro Mitin** (Ruslando) pro *Rivero Honto* kaj **Jesper Jacobsen** (Francio) pro *Homsaĝo*.

Partoprenis 43 verkoj de 22 aŭtoroj el 14 landoj.

PROZO

1a premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *Tri legendoj*;

2a premio: **Ewa Grochowska** (Francio) pro *Sabla reĝlando*;

3a premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *Vasta domo*;

Honora mencio: **Lena Karpunina** (Ruslando) pro *La amnestipeto* kaj **Jesper Jacobsen** (Francio) pro *Subtenu min*.

Partoprenis 21 verkoj de 15 aŭtoroj el 11 landoj.

ESEO

Premio "Luigi Minnaja": **Sten Johansson** (Svedio) pro *Ivan Ŝirjaev — la evoluo de verkisto* kaj **Luiza Carol** (Israelo) pro *La puzlo pri la elefanto*;

2a premio: ne aljuĝita;

3a premio: **Aleksandro Melnikov** (Ruslando) pro *Leksikaj novismoj kaj neologismoj: anatemi aŭ odi?*;

Honora mencio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?* kaj **Brandon Sowers** (Usono) pro *Perspektivoj pri esperanta kinarto*.

Partoprenis 12 verkoj de 8 aŭtoroj el 7 landoj.

TEATRAĴOJ

1a premio: **Carmel Mallia** (Malto) pro *Najbaroj*;

Honora mencio: **Adrienne Pásztor** (Hungario) pro *Ombro en lumo* kaj **José**

Eduardo Rosa Crispim (Portugalia) pro *Fetorafero*.

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

INFANLIBRO

Premio "Infanlibro de la Jaro": eldonejo **PRO100** (Pollando) pro *Kato Koloro* de Moises Gutierrez Raimundez, tradukita de Przemysław Wierzbowski.

Partoprenis 6 verkoj de 6 eldonejoj el 6 landoj.

PREMIO "NOVA TALENTO"

Jesper Jacobsen (Francio).

GK UEA

Ricevitaj libroj

Gvidlibro 2012 / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2012. — 96 p., il. — (Donaco de UEA).

Ilutoviĉ, Klara. *Elkore*: Poemaro. — M.: Impeto, 2012. — 112 p.; 200 ekz. — (Aĉeto).

Jarlibro 2012 / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2012. — 288 p., il. — (Donaco de UEA).

Tomić, Senka. *Lampiro en mozaiko = Svitac u mozaiku*: [Poemaro] / Postparolo de Zlatoje Martinov. — Beograd: Interpress, 2011. — 96 p., il. — 200 ekz. — (Biblioteka Esperanto, №3). — (Recenzoekzempler).

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2012/14; EAB Update, 2012/58; Esperanta Finnlando, 2012/3; Esperanto aktuel, 2012/3; Esperanto en Azio, 2012/76; Esperanto sub la Suda Kruco, 2012/110; Esperanto, 2012/7-8; Ĝenerala Informilo, 2012/172,173; Heroldo de Esperanto, 2012/2,5; Informilo por Interlingvistoj, 2012/2; Internaciisto, 2012/3; KAE-Informilo, 2012/79; Kontakto, 2012/3; La Lanterno Azia, 2012/289, 290; La Ondo de Esperanto, 2012/7; La Revuo Orienta, 2012/6,7; Monato, 2012/7; REGo, 2012/3-4; Scottish Esperanto Bulletin, 2012/2; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2012/2.

Beletra Almanako, №14

La proza sekcio de la 14a almanako enhavas du novelojn: *La ringo* de Mikaelo Bronŝtejn kaj *Nova vivo* de Steven K. Smith. Poezie ĉeestas Ricardo Felipe Albert Reyna, Ivan' Naumov kaj Nicola Ruggiero. Traduke kontribuas Einar Faanes per elangligo de la rakonto *La ĉirkaŭfermo* de Tamas Dobozy.

Teatro gastas en BA per versa monologo de Karnasko *Sansón Carnasco kontraŭ Don Quijote*, verkita de Abel Montagut kaj prezentita de li en la 71a Hispana Kongreso de Esperanto.

La forpasintajn verkistojn omaĝas Gerrit Berveling (Eli Urbanová) kaj Baldur Ragnarsson (John Francis). Memore pri Péter András Rados estas reaperigita lia traduko el Janus Pannonius. Al kunfestado de la 20-jariĝo de la Ibera Grupo kontribuas esee Miguel Fernández pri la jaroj da amikeco kaj kreado.

Pri la anglalingva libro *Unue kiel tragedio, poste kiel farso* de Slavy Žižek meditas Nick Kalivoda, atentiganta, ke "ni vivas en kriz-epoko, en kiu akompanas la maldekstran revolucionan potencialon la atentinda potencialo de novaj faŝismoj..." La eseo de Ana Manero prezentas la situacion kaj viv-itineron de la plej gravaj politikistinoj, verkistinoj kaj alispecaj artistinoj el la epoko de la Dua Respubliko de Hispanio.

Pro la longaj tekstoj en ĉi tiu BA aperas sola recenzo de Wim Jansen pri la *Historia Vortaro de Esperanto 1887–1888* de Gonçalo Neves.

Serio da fotoj de Liven Dek montras poetape la ceramikadon de Pedro Ullate, de kolektado de argilo ĝis la fina produkto kovropaĝe. Okaze mi ŝatus montri tion al amikino, kiu ankaŭ okupiĝas pri ceramikado.

Halina Gorecka

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net


Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la majaj *Malnovaj taskoj* venis nur sep respondoj, kiuj diversgrade proksimiĝis al la ĝusta solvo. Ni dankas al ĉiuj, kiuj rompadis al si la kapojn por solvi la centjaraĝajn enigmojn. Ili estas: Malcolm Jones (Britio), Jackie Huberdeau (Francio), Edeltraut Henning (Germanio), Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Vladimir Vyĉegjanin (Ruslando).

La libropremio iras al la plej bona solvinto *Zbigniew Tylkowski*. Ni gratulas lin!

Respondoj: 1. poŝkalendaro; 2. branĉo — brando; 3. o — k — r: ok, oro, koro, okro, koko, roko; 4. humo, fumo, fuŝo; aŭ: pomo, poŝo, puŝo; aŭ: humo, huzo, muzo; 5. ĝi komencas vivi la trian; 6. tur-mento; 7. bas-tono; 8. Esperanto: sep, teo, ran'; 9. la ombron.

Araneajo



Ĉiuj vortoj havas kvin literojn kaj finiĝas per ~o. Pleniginte ĉiujn ĉelojn, vi tralegos en unu el la vicoj, laŭ la horloĝa turndirekto, proverbon, kondiĉe, ke vi ĝuste enskribis ĉiujn vortojn.

1. Tre malgranda artropodo; 2. Lando kun palmaj folioj surflage; 3. Ĝin eksportas membroj de OPEL; 4. Mineralo kun metaleca brilo; 5. Per tiu ĉi orkestra instrumento oni eligas la plej malaltan tonon; 6. Dividaro en termometro; 7. Vestajo de hindinoj; 8. Longa, rekta glavo; 9. Granda pika trudherbo; 10. Spirita atmosfero de la medio; 11. Stango kun ronda plato iranta tien-reen ene de cilindro; 12. Medio por difino de absoluta indico de refrakto; 13. Kurfandaĵo de metaloj; 14. Taŭge flegata terpeco kun arboj, arbustoj, florbedoj ktp; 15. Malbonaĵo, abomenaĵo; 16. Monaĥo en Tibeto; 17. Post-signo de pasanto; 18. La ĉefurbo de FRG en 1949-1991.

La solvoj devas veni al la redakcio antaŭ la 10a de novembro 2012.

Kompilis Viktor Alikin

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ne al vjetnanoj

Mi garantias al vi ke la postkongresa ekskurso estos gvidata de plenkreska esperantisto el Vjetnamio. (Liberafolio.org/2012/ne-rusoj-kun-poloj-sed-oficistoj-kun-eksoficistoj, stato 13 aŭg 2012)

Kolega transplantato

Transkoli la oficejon kien ajn estas enorma operacio kiu en si mem kostas amason da mono. (Samloke, stato 13 aŭg 2012)

Kial ne la riĉegantojn?

Ĉu pli efike konstrui solidan bazon (informante la simplajn civitanojn kaj ilin varbante) aŭ aliri la povregantojn...? (Michela Lipari. *Ĉu desubismo aŭ desuprismo?* // *Eŭropa Bulteno*, 2012, №117, p. 4)

Potenca senkorka mistero

... estas pli da sklavo en la mondo nuntempe ol iam ajn en la historio de la homaro. Neniu kontinento esceptas, kvankvam [tiele] Azio rekorkas super la ceteraj. (*Sklaveco restas profunda plago en la mondo* // HeKo 510 5-C, 27 jun 2012, esperantio.net/index.php?id=1974 ; rimarkis Ionel Oneț)

Kulinoj kun dentegoj?

Sendepende de la lingva evoluo-evoluigo de la lingvo mem forlasendas la esence lingva kultuta indentigo-direktigo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto farde de la oficiala Esperanto-Movado. (Wolfgang Guenther. *Por viva identeco de Esperanto bezonoj de inda futuro en komunikado* // *Boletín*, 2008, №385, p. 21)

Ĉu kiber-akordionoj?

La aŭtoro... trovas komparanalogian metodon por deĉifri iom post iom kelkajn unuajn harmonikojn en la kibernetika kompreno de la funkciado de la mondo. (Zlatkov Tišljar. *Ekzistado. Kibernetika klarigo de la mondo*. Zagrebo: Izvori, 2012, dorso)

Reciproka rikolto, aŭ: prune senpune

Prunedonu al mi / nur unu kison / ĝin mi redonos / kiam ajn vi volas! (Morteza Mirbaghian. *Kiso*, ipernity.com/blog/mori/351209)

Ĉu por la plumo de Shak-espear?

Kongreso de unuiĝo de francaj espearntistoj (*Eŭropa Bulteno*, 2012, №117, p. 8.)

Kun klara celo

... nur informcele mi informas ke en Aŭstrio ekzistas ĉeno de paperaĵaj vendejoj nomata SKRIBO. (Leopold Patek, 17 dec 2011, yahoo-groupo landa-agado, mesago 16524)

Plukis István Ertl



“En Brazilo oni povas publikigi individuajn poŝtmarkojn, kiuj estas oficialaj, kiujn oni povas uzi por afranki korespondaĵojn”, — skribis al ni la brazila esperantisto Pekim T. Vaz, kiu tute praktike uzas ĉi tiun eblon por Esperanto. Ni dankas lin pro la du poŝtmarkoj, kiuj omaĝas *La Ondon de Esperanto*. Unu el ili estas ĉi-apude.

ARKONES premiita

En la Hanoja UK oni anoncis, ke la fondaĵo Antoni Grabowski (FAG), starigita antaŭ pli ol dudek jaroj dank' al donaco de s-ro Adam Goralski por subteni la Esperantan kulturon, donis premion je la sumo de 500 usonaj dolaroj al ARKONES. La komisiono pravigis sian elekton jene:

Ĝis nun la subteno de FAG koncentriĝis al individuoj kaj institucioj. Ĉi-jare unu el la du premioj iras unuafoje al renkontiĝo, kultura aranĝo, kiu iusence jam iĝis "institucio", kreante tradicion kaj allogante lojalan, engaĝitan partoprenantaron: ARTaj KONfrontoj en ESperanto (Arkones) en Poznano, Pollando.

Ĝi estis iniciatita de artemaj kaj lingvemaj polaj (eks)studentoj en 1985, kiam ankoraŭ regis komunisma reĝimo. Tra la jaroj la aranĝo kreskis kaj internaciigis; ĝi celas publikon ne nur junularan, sed plue estas ĉefe organizata de gejunuloj. Arkones distingiĝas per tre varia programo, kovranta preskaŭ la tutan spektron de la Esperanta kulturo: estas kutime trideko da prelegoj, koncertoj, spektakloj, laborgrupoj, diskutoj kaj konkursoj. La aranĝo vivas pro la laboro de volontuloj. Kelkaj konataj nomoj aperas, sed estas ĉiam altirataj ankaŭ novaj talentuloj. En Arkones, kiun aŭspicias UEA kaj TEJO, nun kutime partoprenas pli ol 200 homoj el pli ol 20 landoj. Notindas, ke ĝi estas tempe kaj organize ligita al la studprogramo "Interlingvistikaj studoj" de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

La partoprenantoj entuziasme raportas, ke Arkones donas al ili ne nur intelektan riĉigon, sed ankaŭ plezuron. Ne estas mirige, ke ĝi apartenas al la plej viglaj kaj popularaj manifestacioj de la Esperanta kulturo. Tion FAG per sia premio celas rekonii.

La eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo* planas veni ĉi-jare al Poznano kaj rekomendas tion al la abonantoj.



Indonezio. Heidi Goes por la tria fojo instruis Esperanton en Indonezio, ĉi-foje ne nur al novuloj, sed ankaŭ en kluboj kaj grupoj jam starigitaj. Danke al tio en Jogjakarto la iam starigita grupo reviviĝis kaj ricevis la nomon *La verda paco* dum la jubilea festo de Esperanto la 26an de julio. (Heidi Goes)




Germanio. Preskaŭ dum la tuta julio en la montrofenestro de la librovendejo Matthias en Hameln oni povis vidi librojn en/pri Esperanto kaj aliajn esperantaĵojn. Je la jubilea tago, la 26an de julio, la prezidanto de la loka Esperanto-Grupo Heinz-Wilhelm Sprick prelegis tie pri la 125-jariĝo de Esperanto. (HWS)



Pollando. La 125-jariĝon de Esperanto oni omaĝis per centoj da festoj kaj kunvenoj. Ili estis tre malsamaj – grandaj kaj etaj, oficialaj kaj amikaj – sed la plej dolĉa okazis en Nowy Sącz (vd. p. 10), kie oni festis la jubileon kun grandega, kelketaĝa jubilea Esperanto-torto. (Halina Komar)




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satori kaj humuraĵoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junaĝo de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondlingvo.
160 paĝoj, € 15,0.